

A. A. Saĥarov.

А. А. Сахаровъ.



**SUR VOJO**

AL

**KUNFRATIĜO DE POPOLOJ.**

**Kolekto da artikoloj**

pri internacia lingvo

**ESPERANTO**

En esperanta kaj rusa  
lingvoj.

Kun almeto de Esperanta GRAMATIKO, de plena esperanta-rusa kaj mallongigita rusa-esperanta

**VORTAROJ.**

UNUA ESPERANTISTA TIPOGRAFIO

EN KAZANO

de I. N. Ĥaritonov.

1907.

**НА ПУТИ**

КЪ

**БРАТСТВУ НАРОДОВЪ.**

**СБОРНИКЪ СТАТЕЙ**

о международномъ языкѣ

**ЭСПЕРАНТО**

На эсперанто и русскомъ  
языкахъ.

Съ приложеніемъ ГРАММАТИКИ языка Эсперанто, полного эсперанто-русского и сокращеннаго русско-эсперантскаго

**СЛОВАРЕЙ.**

ПЕРВАЯ ЭСПЕРАНТСКАЯ ТИПОГРАФІЯ

ВЪ КАЗАНИ

И. Н. Харитонова.

1907.



## Въ Обществѣ „ЭСПЕРО“ продаются слѣдующія книги


(С.-Петербургъ, Б. Подъяческая, д. № 24).

L. Zamenhof. Fundamenta Krestomatio . . . . .	1 р. 40 к.
Л. Заменгофъ. Универсальный Словарь . . . . .	— р. 40 к.
Д-ръ Эсперанто. Полный Русско-Эсперантскій Словарь . . .	1 р. — к.
Л. Заменгофъ. Полный учебникъ языка Эсперанто съ предисловіемъ и двумя словарями . . . . .	— р. 25 к.
Т. Щавинскій. Полный систематическій курсъ Эсперанто . .	1 р. 25 к.
Р. Fruiktier. Esperanta Sintakso . . . . .	— р. 60 к.
А. Grobovski. Kondukanto de interparolado kun la antologio internacia. (Руководство къ разговору на языкѣ Эсперанто). . . . .	— р. 80 к.
Деятинъ В. Н. Полное собраніе сочиненій, 1-й т. . . . .	— р. — к.
2-й т. . . . .	1 р. 25 к.

Здѣсь же принимается подписка на ежемѣсячный журналъ „Ruslanda Esperantisto“ съ записью въ члены Общества „Эсперо“ . . . . . 3 р. — к.

Отъ Парижской фирмы „Hachette kaj K<sup>o</sup>“ 79, Boul. St. Germain  
можно получить слѣд. соч. L. de Beaufront:

Grammaire et exercices de la langue Esperanto . . . . .	1,50 fran.
Commentaire sur la Grammaire Esperanto . . . . .	2 „
Dictionnaire Esperanto-Français . . . . .	1,50 „




**Лито-Типографія**  
**И. Н. Харитонова**

Казань. Пассаждь.

**Принимаетъ экстренныя работы:**  
изящныя и простыя,  
солидныя и мелкія.

---

Визитныя карточки въ 1½ часа.

ПЕЧАТАЮТСЯ КНИГИ  
НА ЯЗЫКѢ „ЭСПЕРАНТО“  
и на другихъ иностранныхъ  
языкахъ.



## Предисловіе составителя.

Цѣль издаваемой книги заключается въ возможно широкомъ пропагандированіи среди Русскаго Общества идеи международнаго языка въ той ея формѣ, какъ она выразилась въ языкѣ Эсперанто. Сообразно съ этою цѣлью книга раздѣляется на два отдѣла: одинъ состоитъ изъ изложенія грамматики языка Эсперанто и изъ Эсперанто-русскаго и Русско-эсперантскаго словарей, другой же отдѣлъ представляетъ изъ себя сборникъ статей, которыя могутъ служить съ одной стороны матеріаломъ для упражненія въ языкѣ Эсперанто, а съ другой—онѣ всесторонне выясняютъ сущность и громадное значеніе для человѣчества идеи международнаго языка \*). Въ виду послѣдняго обстоятельства составитель считаетъ нужнымъ указать въ своемъ предисловіи лишь на тѣ достоинства языка Эсперанто, которыя невольно возбуждаютъ въ каждомъ образованномъ человѣкѣ желаніе пожертвовать незначительнымъ количествомъ своего свободнаго времени, чтобы заняться изученіемъ этого великаго изобрѣтенія конца прошедшаго столѣтія и принадлежащаго варшавскому доктору Л. Заменгофъ.

Достоинство языка Эсперанто заключается въ слѣдующемъ: 1) грамматика его необыкновенно легка и можетъ быть изучена въ полчаса; 2) словарь его также необычайно легокъ, такъ какъ авторомъ языка даны такіе приемы, которые позволяютъ изъ одного корня создавать нѣсколько словъ, не изучая послѣднихъ; 3) коренныя слова взяты изъ важнѣйшихъ европейскихъ языковъ въ наиболѣе употребительной формѣ ихъ и не представляя никакихъ трудностей для необразованныхъ, они почти безъ изученія понятны людямъ, мало-мальски образованнымъ; 4) языкъ Эсперанто звученъ, гибокъ, богатъ и уже вполне испробованъ во всѣхъ отрасляхъ человѣческаго знанія и искусства.

О простотѣ этого языка графъ Л. Н. Толстой пишетъ: „легкость обученія его такова, что получивъ эсперантскую грамматику, словарь и статьи, написанныя на этомъ языкѣ, я послѣ не болѣе двухъ часовъ занятій былъ въ состояніи если не писать, то свободно читать на этомъ языкѣ“.

Благодаря такой простотѣ языка Эсперанто, онъ несмотря на свое появленіе въ свѣтъ только въ 1887 году, уже завоевалъ себѣ такое положеніе, что изучающіе его въ настоящее время считаются милліонами. Имъ занимаются какъ диллетанты и практики, такъ и многіе ученые, которые нашли его пригоднымъ не только для обычной жизни, но и для

\*) Примѣчаніе. Въ Сборникѣ помѣщено одно стихотвореніе извѣстнаго русскаго поэта эсперантиста В. Н. Деятнина, чтобы показать, насколько языкъ Эсперанто является пригоднымъ и для стихотворной формы литературныхъ произведеній.



науки. Въ настоящее время почти во всѣхъ государствахъ есть города, гдѣ ведутся постоянные систематическіе курсы Эсперанто; въ разныхъ государствахъ существуетъ уже множество Эсперантскихъ Обществъ, группъ, кружковъ и т. д.; въ разныхъ городахъ издается на языкѣ Эсперанто около 30 періодическихъ изданій; на Эсперанто производится переписка между лицами самыхъ разнородныхъ національностей; языкъ этотъ принятъ многими коммерческими фирмами, какъ для деловой переписки, такъ и для рекламированія своихъ издѣлій и товаровъ; съ цѣлью испробованія степени пригодности этого языка для разговорныхъ сношеній въ 1905 году состоялся во Французскомъ городѣ Булони первый конгрессъ эсперантистовъ, который увѣнчался въ этомъ отношеніи полнымъ успѣхомъ; въ 1906 году такой же конгрессъ назначенъ на 15/28 Августа въ Швейцарскомъ городѣ Женевѣ, а въ слѣдующіе годы они предполагаются и въ другихъ государствахъ.

Изъ вышеизложеннаго видно, что языкъ Эсперанто въ настоящее время занялъ уже такое прочное положеніе, что изучающіе его ни въ какомъ случаѣ не рискуютъ напрасно потерять свое время; напротивъ, многія данныя убѣждаютъ, что недалеко то время, когда языкъ Эсперанто будетъ введенъ въ курсъ обязательныхъ предметовъ каждаго учебнаго заведенія и когда на него будутъ переводиться всѣ выходящія или уже вышедшія въ свѣтъ сочиненія, имѣющія общечеловѣческой интересъ. Для Россіи пока центральнымъ мѣстомъ, гдѣ можно получать всѣ свѣдѣнія по языку Эсперанто, служитъ Петербургское Общество „Эсперо“. Правленіе его находится на Больш. Подъяческой улицѣ, въ домѣ № 24. Этимъ же Обществомъ издается подъ редакціей доктора Аснесъ и г. Радванъ-Рипинскаго ежемѣсячный Эсперантскій Журналъ „*Ruslanda Esperantisto*“, стоющій вмѣстѣ съ записью въ члены Общества „Эсперо“ 3 руб. въ годъ. Для лицъ, которые пожелаютъ заняться языкомъ Эсперанто, мы рекомендуемъ застаться книгой д-ра Заменгофъ: „*Fundamenta Krestomatio*“, стоющей 1р. 40к. и представляющей обширный сборникъ разныхъ статей, рассказовъ и стихотвореній на языкѣ Эсперанто. Кромѣ того, для нихъ необходимо приобрести Русско-Эсперантскій Словарь, стоющій 1 руб. и Эсперанто-Русскій Словарь, стоющій 40 коп. Изданія эти можно приобрести или отъ самого автора, въ г. Варшавѣ, ул. Дикая № 9 или же отъ вышеназваннаго Общества Эсперо.

Въ заключеніе составитель считаетъ себя обязаннымъ принести свою глубокую благогарность авторамъ помѣщенныхъ въ Сборникѣ статей господамъ Дэ-Бофронъ, Л. Бельмонтъ, В. Н. Девятнину, Редакціи Журнала „*Ruslanda Esperantisto*“ и автору языка Д-ру Заменгофъ за то любезное сочувствіе, съ коимъ они отнеслись къ изданію настоящей книги при разрѣшеніи помѣстить въ ней часть ихъ трудовъ.

Г. Ардатовъ, Симбирской губ.  
2 Мая 1906 года.

А. Сахаровъ.



## ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LINGVO IN- TERNACIA.

Raporto de anonima aŭtoro, legita de s-ro L. de Beaufront en la kongreso „de l'Association Française pour l'Avancement des Sciences“.  
(Parizo, 1900).

### I.

Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman egalan sorton: kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinde obstina malkonfido, sed eĉ kun ia neklarigebla malamikeco; la pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi; oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine eĉ rekte kiel homojn tre malutilajn. Dum la homoj, kiuj okupas sin je ĉia plej sencela kaj senutila sensencaĵo, se ĝi nur estas en modo kaj konforma al la rutinaj ideoj de la amaso, ĝuas ne sole ĉiujn bonojn de la vivo, sed ankaŭ la honoran nomon de „instruituloj“ aŭ „utilaj publikaj agantoj“, la pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion krom moko kaj atakoj; la unua renkontita tre malmulte lerninta budo rigardas ilin de alte kaj diras al ili, ke ili okupas sin je malsaĝaĵoj; la unua renkontita gazeta felietonisto skribas pri ili „spritajn“ artikolojn kaj notojn, ne preninte sur sin la

## СУЩНОСТЬ И БУДУЩНОСТЬ ИДЕИ МЕЖДУНАРОДНОГО ЯЗЫКА.

Докладъ анонимнаго автора, прочитанный Г. Л. де Бофронъ на конгрессѣ Французской Ассоціаціи поощренія наукъ. (Парижъ, 1900 года).  
Переводъ съ Эсперанто А. А. Сахарова.

### I.

Всѣ идеи, коимъ суждено играть громадную роль въ исторіи человечества, постоянно имѣютъ одну и ту же участь: когда онѣ появляются, современники встрѣчаютъ ихъ не только съ замѣчательно упорнымъ недовѣріемъ, но даже съ какой-то необъяснимой враждою; пионеры этихъ идей бывають вынуждены выдерживать большую борьбу и переносить много страданій; на нихъ смотрять, какъ на людей сумасшедшихъ, дѣтски неразумныхъ и наконецъ какъ на людей вредныхъ. Въ то время, какъ люди, которые занимаются всякой самой безцѣльной и бесполезной глупостью, если только она въ модѣ и соотвѣтствуетъ рутиннымъ идеямъ толпы, пользуются не только всѣми благами жизни, но еще почетнымъ именемъ „ученыхъ“ или „полезныхъ общественныхъ дѣятелей“, пионеры новыхъ идей не встрѣчаютъ ничего, кромѣ насмѣшекъ и нападокъ: первый встрѣчный мало учившійся мальчикъ смотритъ на нихъ свысока и говоритъ имъ, что они зани-



laboron almenaŭ iom ekscii, super kio ili propre laboras; kaj la publiko, kiu ĉiam iras kiel anaro da ŝafoj post la kriemuloj, ridas kaj ridegas kaj eĉ por unu minuto ne faras al si la demandon, ĉu ekzistas eĉ guto da senco kaj logiko en ĉiuj tiuj ĉi „spritaj“ mokoĵ.

Pri tiuj ĉi ideoj „estas modo“ paroli ne alie, ol kun ironia kaj malestima rideto, tial tiel agas ankaŭ A, kaj B, kaj C, kaj ĉiu el ili timas enpensiĝi serioze eĉ unu minuton pri la mokata ideo, ĉar li „scias antaŭe“, ke „ĝi krom malsaĝaĵo enhavas ja nenion“, kaj li timas, ke oni iel kalkulos lin mem al la nombro de „tiuj malsaĝuloj“, se li eĉ en la daŭro de unu minuto provos rilati serioze al tiu ĉi malsaĝaĵo. La homoj miras, „kiamaniere en nia praktika tempo povas aperi tiaj malsaĝaj fantaziuloj kaj kial oni ne metas ilin en la domojn por frenezuloj.

Sed pasas kelka tempo. Post longa vico da batalado kaj suferoj la „buboj-fantaziuloj“ atingis la celon. La homaro fariĝis pli riĉa per unu nova grava akiro kaj eltiras el ĝi la plej vastan kaj diversforman utilon. Tiam la cirkonstancoj ŝanĝiĝas. La jam fortiĝinta nova afero ŝajnas al la homoj tiel simpla, tiel „komprenebla per si mem“, ke la homoj ne komprenas, kiamaniere oni povis

maŭto glnostjama; nertvuj vstruĉnuj gazetnuj feljetonistuj nlnsetuj pro nlnx ostroumnuj statuj n lnzamtuj, ne vzavnu na seba tuda xot skolku nlnbudu lzudnu tu, nadu ĉfm̄u onl sobstvenno rabotauju, n pnbllka, kotora n detu vseĝa, kak stadu ovecu, za krlkuna, sm̄etenu n lzduvauetu vm̄st̄u su nlnl n dake vu nertvu nlnutu ne zaduet sebu vu proua, suĝestvetu ll xot kapla smysla n loglkl vo vs̄x̄u etlxx „ostroumnux“ nas̄m̄uŝkax̄.

Pro etl ideo „suĝestvetu moda“ ĝovortu ne nnaĉe, kak su pronlĉeskoj n prezrntelnojl usm̄uŝkoj, postou tu kak d̄f̄l̄stvetuju n A. n B. n C. n kakdu lz nlnx boftu vduvatenu serjuzno dake na onu nlnutu vu osm̄f̄l̄vauemu ideo, nbo on̄ „znauet naперед“ ĉu „ona krom̄ glnostl ne sodertu nlnĉe“; ku etou prlsoedlnueta ona senle, kak bu n ego ne prlĉlsl llll ku ĉlslu „etlxx glnostv̄u“ xot bu on̄ tolku vu telenl onu nlnutu postatenu otnetlsl serjuzno ku etou glnostl. Ljudl udlvlnueta, kaklm̄ obradom̄ vu nase praktlĉesko vlme mogut postavl̄tu takle glnue fantazeru n poĉemu nxx ne saĝauju vu doma umallnnenux.

No prouduet n̄kotoro vlme. Post̄ dlnnago rjadu sraĝenl n stradanel „malĉlkl fantazeru“ dostlĝauju ĉf̄ll. ĉelov̄ĉestvo obogaĉauetu odnm̄ novm̄ vaxnmm̄ prlobr̄tenuem̄ n lzvlakaetu lz neĝo oblnrnl̄ŝlŝu n raznobarln̄ŝlŝu polzu. Toga obroutelstvetu m̄f̄nlnueta. Uĝe ukorenlnv̄seenu no vo d̄blo kaketu taku proustm̄ n „samo sobo postn̄nm̄“, ĉu



tutajn miljarojn vivi sen ĝi. Kiam la posteuloj legas la rakontojn pri tio, kiel sin tenis kontraŭ la dirita ideo la samtempuloj de ĝia naskiĝo, ili absolute ne volas kredi kaj pensas, ke ĉion tion ĉi elpensis la historioskribantoj pro mokado je la foririntaj generacioj. „Ĉu efektive“, ili diras, „la tuta mondo tiam konsistis el idiotoj? Ĉu efektive ekzistis homoj, kiuj elpaŝadis kontraŭ la pioniroj kun tiaj sensencaj kontraŭparoloj kaj la ceteraj homoj silentadis kaj la unua renkontita kvinjara infano ne diradis al tiuj kritikantoj: „sinjoroj, vi ja parolas teruran, sur nenio fonditan sensencaĵon, kies rebato sin trovas ja tuj antaŭ via nazo!“? Absolute nekompreneble! La historistoj certe trograndigas!“

Legu la historion de naskiĝo de la kristaneco kaj de diversaj grandaj ideoj en la regiono de moralo, filozofio kaj scienco; legu la historion de la eltrovo de Ameriko, de la enkonduko de fervojoj k. t. p. k. t. p. Ĉie tute tio sama. „Es ist eine alte Geschichte, doch bleibt sie immer neu“. La lumo aperas, kiel necesa bezonataĵo al tiu, kiu staras malproksime, sed al la proksime starantaj ĝi tranĉas la okulojn kaj ili penas estingi ĝin. La ideo de Kolumbo, ke „devas ekzisti okcidenta vojo Hindujon“, ŝajnas al ni nun tiel simpla, tiel natura, kaj ni simple ne volas kredi, ke povis iam ekzisti homoj, kiuj, sciante jam, ke la tero estas globo, povis dubi, ke al ĉia lando oni povas veni ne sole de oriento,

люди не понимают, каким образом столько тысячелетий они могли жить без него. Когда потомки читают рассказы про то, как относились к сказанной идее современники ее рождения, они положительно не хотят верить и думают, что все это выдумано историками в насмешку над исчезнувшими поколениями. Неужели в самом деле, говорят они, весь мир состоял тогда из идиотов, неужели в действительности существовали люди, которые выступали против пионеров с такими глупыми возражениями, а прочие люди молчали и первое встречное пятилетнее дитя не могло сказать этим критикам: „господа, вы ведь говорите страшную, ни на чем не основанную глупость, опровержение коей находится предь самым вашим носом!“ Совершенно не понятно! Историки конечно преувеличивают!

Прочитайте историю рождения христианства и разных великих идей в области морали, философии и знания; прочитайте историю открытия Америки, введения железных дорог и т. д. Везде одно и то же. Es ist eine alte Geschichte doch bleibt sie immer neu“. Светь открывается, как необходимая потребность, тому, кто стоит в отдалении, для близь же стоящих он рѣжет глаза и они стараются погасить его. Мысль Колумба, что „должен существовать западный путь в Индию“ кажется нам теперь так простой, так натуральной и мы просто не хотим верить, что могли некогда существовать люди, которые, зная уже, что земля есть шар, могли сомневаться, что к



sed ankaŭ de okcidento, kaj ke en tiu ĉi ne esplorita okcidento povas eble troviĝi ne konataj al ni interesaj landoj. Kiam ni legas tiujn kontraŭparolojn, kiujn oni tiam faradis al Kolumbo, ekzemple, ke neniu okcidenten de Eŭropo veturis, sekve ĝi estas ne ebla, ke Dio malpermesis tion ĉi fari, ke la ŝipoj malleviĝados malsupren kaj ne povos returne leviĝadi supren... k. t. p., — ni kontraŭvole demandas nin, kiamaniere homoj maturaĝaj povis paroli tiajn sensencaĵojn, pro kiuj en nia tempo ruĝiĝus ĉia infano. Kaj tamen en tiu tempo ĝuste tiuj ĉi naivaj kontraŭparoloj estis rigardataj kiel veroj, ne ebligantaj ian dubon, kiel plej logika opinio de la tuta prudenta mondo, kaj la ideoj de Kolumbo estis kalkulataj kiel infanaĵo, kiu estas inda nenian atenton. Kiam oni montris al la homoj la forton de la vaporo kaj ĝian uzeblecon, ŝajnis, ke kia prudenta homo povus ion kontraŭparoli kontraŭ ĝi? Kaj tamen kiam da multjara batalado, suferoj kaj moko la elpensinto devis elporti! kaj eĉ tiam, kiam fine prosperis jam atingi la celon, kiam en Anglujo jam dum tutaj tri jaroj la lokomotivoj kursadis kaj alportadis grandegan utilon, sur la kontinento de Eŭropo instruitaj homoj kaj eĉ tutaj instruitaj korporacioj, anstataŭ simple ekrigardi kaj konvinkiĝi, skribadis ankoraŭ profunda-pensajn traktatojn pri tio, ke konstruado de lokomotivoj estas infana entrepreno, ke ĝi estas ne ebla, ke ĝi estas malutila k. t. p. Kio tio ĉi estas? ni demandas nin; ĉu tio ĉi estis ia ĉiuhoma epidemia idioteco? ĉu efektive ekzistis tiaj gene-

каждой странѣ можно подойти не только съ востока, но и съ запада и что въ этомъ не изслѣдованномъ западѣ могутъ быть найдены неизвѣстныя для насъ интересныя страны. Когда мы читаемъ тѣ возраженія, которыя тогда дѣлали Колумбу, напримѣръ, что никто изъ Европы на западъ не ѣздилъ, слѣдовательно это не возможно, что Самъ Богъ запретилъ это дѣлать, что корабли спустятся внизъ и не смогутъ снова подняться вверхъ и т. д., мы невольно задаемъ себѣ вопросъ: какимъ образомъ зрѣлые люди могли говорить такія глупости, изъ за которыхъ въ наше время покраснѣлъ бы ребенокъ. И однако, въ то время такія наивныя возраженія разсматривались, какъ истина, невозбуждающая въ себѣ никакого сомнѣнія, какъ наиболѣе логическое мнѣніе всего благомыслящаго свѣта, и идеи Колумба считались, какъ мальчишество, которое не заслуживаетъ никакого вниманія. Когда доказали людямъ силу пара и его пользу, казалось, что какой разумный человекъ могъ что либо возражать противъ этого? И однако сколько многолѣтней борьбы, страданій и насмѣшекъ долженъ былъ вынести его изобрѣтатель! И даже тогда, когда, наконецъ, удалось уже достигнуть цѣли, когда въ Англии уже въ теченіе цѣлыхъ трехъ лѣтъ ходили и приносили большую пользу локомотивы, на континентѣ Европы ученые люди и даже цѣлыя ученые корпорации, вмѣсто того, чтобы по просту посмотреть и убѣдиться, продолжали писать глубокомысленныя трактаты о томъ, что постройка локомотивовъ есть дѣтское предпріа-



racioj? Jes, ekzistis tiaj generacioj, kaj ni, kiuj nun miregas, ni en efektiveco estas ne pli bonaj ol ili, kaj niaj nepoj estos ne pli bonaj ol ni. Ĉiuj tiuj ĉi homoj kun iliaj indignige sensencaj kontraŭparoloj kaj atakoj estis tamen ne idiotoj, kvankam ili nun eble ŝajnas al ni tiaj. Ilia tuta kulpo konsistis nur en tio, ke, dank' al la natura spirita inercio de ĉiu el ni, ili aŭ tute ne volis prijuĝi la naskiĝantajn novajn aperojn, plivolante limigi sin per sanosubtenanta ridado, aŭ alpaŝadis al la prijuĝado kun antaŭe jam preta konvinko, ke la afero proponata al ili estas neplenumbla, kaj ĉiujn siajn argumentojn ili penadis konformigadi al tiu antaŭe farita decido, ne rimarkante la tutan senfundamentecon de tiuj ĉi argumentoj, kaj kontraŭ la argumentoj de la defendantoj de la nova ideo ili fermadis sian cerbon per la plej fortikaj seruroj, kaj tial tiuj ĉi lastaj argumentoj, kiuj penadis pruvi la eblecon de tio, „pri kio ĉiuj ja scias, ke ĝi estas neebla“, devis ŝajni al tiuj inerciaj homoj tiel same infanaj, kiel al ni nun ŝajnas iliaj tiamaj kontraŭparoloj.

Al tiaj ideoj, kiuj al la samtempuloj ŝajnas senenhava fantazio kaj al la posteuloj ŝajnas tia natura afero, ke ili ne komprenas, kiamaniere la homoj miljarojn vivis sen ĝi,—al tiaj

tiel, что это не возможно, что это бесполезно и т. д. Что это такое?, спрашиваемъ мы себя: неужели это было общечеловѣческое эпидемическое идиотство? и неужели существовали такія поколѣнія? Да, такія поколѣнія существовали и мы, которые теперь этому удивляемся, мы въ дѣствительности не лучше, чѣмъ они, а наши внуки не будутъ лучше, чѣмъ мы. Всѣ эти люди съ ихъ недостойно бессмысленными возраженіями и нападками были не идиоты, хотя они теперь намъ и кажутся таковыми. Вся ихъ вина состояла въ томъ, что благодаря естественной душевной инерціи каждаго изъ насъ, они или совсѣмъ не желали обсуждать нарождающіяся новыя явленія, предпочитая ограничиваться самоуспокаивающимъ смѣхомъ, или подходили къ обсужденію съ предвзятымъ убѣжденіемъ, что предлагаемое имъ дѣло невыполнимо, и всѣ свои аргументы они старались подогнать къ этому заранѣе сдѣланному рѣшенію, не замѣчая всей неосновательности этихъ аргументовъ, а противъ аргументовъ защитниковъ новой идеи они запирали свой мозгъ крѣпчайшими замками и поэтому-то эти послѣдніе аргументы, которые старались доказать возможность того, „про что всѣ уже знаютъ, что оно не возможно“ должны были казаться этимъ инертнымъ людямъ на столько же ребяческими, на сколько ребяческими кажутся намъ теперь возраженія противъ нихъ.

Къ такимъ идеямъ, которыя современникамъ кажутся безсодержательной фантазіей, а потомкамъ такимъ естественнымъ дѣломъ, что они не понимаютъ, какъ люди въ



ideoj apartenas ankaŭ la ideo de enkonduko de komuna lingvo por la komunikiĝoj inter diversaj popoloj. Kiam niaj posteuloj legos en la historio, ke la homoj, tiuj ĉi reĝoj de la tero, tiuj ĉi plej altaj reprezentantoj de la monda inteligenteco, tiuj ĉi duon-dioj, en la daŭro de tutaj miljaroj vivis unuj apud la aliaj, ne komprenante unuj la aliajn, ili simple ne volos kredi. „Por tio ĉi oni ja bezonis nenian supernaturan forton, ili diros; ĉiu el tiuj ĉi homoj posedis ja kolekton da kondiĉaj sonoj, per kiuj li tute precize kompreniĝadis kun siaj plej proksimaj najbaroj, — kiel do ne venis al ili en la kapon konsentiĝi inter si, ke unu el tiaj kolektoj da kondiĉaj sonoj estu enkondukita por la reciproka kompreniĝado inter ĉiuj, simile al tio, kiel por la plimulto de la kulturaj popoloj estis enkondukita jam longe unu kondiĉa kolekto da mezuroj, unu kondiĉa alfabeto, unuj kondiĉaj muzikaj signoj k. t. p.“ Niaj posteuloj indignos, kiam ili ekscios, ke la homojn, kiuj penadis pri la enkonduko de komuna lingvo, la samtempuloj montradis per la fingroj, kiel maniulojn, bubojn, ne meritantajn la nomon de seriozaj homoj; ke pri tiuj ĉi homoj ĉiu malplenkapulo povis spritadi en la gazetoj, kiom li volis, kaj troviĝis neniuj, kiu dirus al tiuj malplenkapuloj: „vi povas trovi tiujn ĉi ideojn plenumebajn aŭ ne plenumebajn, — sed moki ilin, eĉ ne konatiĝinte kun ili, estas honte, sinjoroj!“ Kore ridegos niaj posteuloj, kiam ili aŭdos tiujn naivajn kontraŭparolojn, kiujn multaj el niaj samtempuloj faradis kontraŭ la ideo de lingvo internacia entute kaj de lingvo arta speciale.

течении тысячелѣтій могли жить безъ него—къ такимъ идеямъ принадлежитъ также и идея введенія всеобщаго языка для сношеній между различными народами. Когда наши потомки прочитаютъ въ исторіи, что люди, эти цари земли, эти наиболѣе высокіе представители міроваго разума, эти полубоги въ продолженіе столькихъ тысячелѣтій жили одни рядомъ съ другими, не понимая другъ друга, они просто не повѣрятъ этому. „Для этого они не нуждались ни въ какой сверхъестественной силѣ, скажутъ они; каждый изъ тогдашнихъ людей располагалъ коллекціей условныхъ звуковъ, благодаря которымъ онъ вполне точно могъ изъясняться съ своими ближайшими сосѣдами;—почему же не пришло имъ въ голову согласиться между собой, чтобы одна изъ этихъ коллекцій условныхъ знаковъ была введена для взаимнаго объясненія между всѣми, подобно тому, какъ для большинства культурныхъ народовъ была введена уже давно условная коллекція мѣръ, условный алфавитъ, условные музыкальные знаки и т. д. Наши потомки будутъ негодовать, когда они узнаютъ, что на людей, которые боролись за введеніе всеобщаго языка, современники показывали пальцами какъ на маньяковъ, мальчиковъ, не заслуживающихъ названія серьезныхъ людей; что про этихъ людей каждый пустоголовый могъ острить въ газетѣ, сколько хотѣлъ и не находилось человѣка, который бы сказалъ этимъ тупицамъ: „господа, вы можете находить эти идеи выполнимыми или невыполнимыми, но насмѣхаться надъ ними, даже не



Simile al tio, kiel ni kun rideto de kompato rilatas al tiu el niaj pra-praavoj, kiu antaŭ kelke da miljaroj eble protestis kontraŭ la enkonduko de arta alfabeto, kriante kun la aplombo de insruitulo, sed tute senpruve, ke rimedo por la esprimado de niaj pensoj estas objekto organa, natura, kreita de la historio (skribado per hieroglifaj desegnaĵoj) kaj ne povanta „esti kreita en kabineto“, — tiel niaj posteuloj, mokados tiujn niajn samtempulojn, kiuj nur pro tiu nenion diranta cirkonstanco, ke la nunaj lingvoj kreiĝis blinde per si mem, aŭtoritate certigas, ke lingvo ne povas esti kreita arte.

Ĝis nun ne estis, sekve ne povas esti!“ — „Kiel mi povas kredi“, diros en la venonta centjaro ja dekjarlerna lernanto al sia instruanto, „ke ekzistis homoj, kiuj neadis la eblecon de ekzistado de arta lingvo, kiam antaŭ ilia nazo tia lingvo jam ekzistis, havis jam riĉan literaturon kaj bonege plenumadis jam en la praktiko ĉiujn funkciojn, kiujn oni povas postuli de lingvo internacia, kaj tiuj ĉi sinjoroj, anstataŭ babiladi ĉiam teoriantan sensencaĵon, bezonis nur malfermi la okulojn kaj ekrigardi! Ĉu estas eble, ke homoj maturaĝaj parolus

ознакомившись съ ними, стыдно!“ Сердечно будутъ смѣяться наши потомки, когда они услышатъ тѣ наивныя возраженія, которыя многія изъ нашихъ современниковъ дѣлали противъ идеи международного языка вообще и искусственнаго языка въ особенности. Подобно тому, какъ мы съ усмѣшкой состраданія относимся къ тѣмъ изъ нашихъ прапрадѣдовъ, которые нѣсколько тысячилѣтій тому назадъ возможно протестовали противъ введенія искусственнаго алфавита, восклицая съ апломбомъ ученаго, но совершенно бездоказательно, что средство для выраженія нашихъ мыслей есть предметъ органической, природной, созданный исторически (писаніе іероглифическими знаками) и не можетъ „быть создано въ кабинетѣ“, такъ наши потомки будутъ смѣяться надъ тѣми нашими современниками, которые только на основаніи того ничего не выражающаго обстоятельства, что существующіе языки создались безсознательно, сами собой, авторитетно увѣряютъ, что языкъ не можетъ быть созданъ искусственно.

„До сего времени не было, слѣдовательно не можетъ быть!“ Какъ мы можемъ вѣрить“, скажетъ въ будущее столѣтіе какой нибудь десятилѣтній ученикъ своему учителю „что были люди, которые отрицали возможность существованія искусственнаго языка, когда предъ ихъ носомъ этотъ языкъ уже существовалъ, имѣлъ уже богатую литературу и прекрасно выполнялъ на практикѣ всѣ функціи, которыя можно требовать отъ языка международного, въ то время какъ этимъ господамъ нужно было только, вмѣ-



ĉiam frazistan sensencaĵon pri ia diferenco de la voĉaj organoj ĉe la popoloj, kiam ĉiu infano vidis sur ĉiu paŝo membrojn de unu popolo, bonege parolantajn en la lingvo de alia popolo!“ Kaj la instruanto respondos: „ĝi estas efektive nekredbla, kaj tamen ĝi tiel estis!“.

Cetere en la nuna tempo en la afero de lingvo internacia la rutino kaj spirita inercio komencas iom post iom cedadi al la sana prudento. Jam longe tie aŭ aliloke en diversaj gazetoj kaj revuoj aperas artikoloj plenaj de aprobo por la ideo mem kaj por ĝiaj batalantoj. Sed tiuj ĉi artikoloj estas ankoraŭ senkuraĝaj, kvazaŭ la aŭtoroj timas, ke oni ne elmetu ilin al publika malhonoro. Tiuj ĉi senkuraĝaj voĉoj perdiĝas en la laŭtega ĥoro de la kriistoj kaj mokistoj, tiel ke la grandega plimulto de la publiko, kutiminta iradi nur tien, kie oni krias la plej laŭte, kaj opiniadi ĉiun mokanton saĝulo, ĉiun atakanton bravulo kaj ĉiun atakaton kulpulo, ĉiam ankoraŭ rigardas la ideon de lingvo internacia kiel sencencan infanan fantazion. Tiun ĉi publikon konvinki ni ne entreprenas, ĉar ĉiuj niaj vortoj pereus vane. Ĝin konvinkos nur la tempo. Morgaŭ ĝi al la pioniroj de la ideo konstruos monumentojn kun tia sama anara sento, kun kiu ĝi hodiaŭ superĵetas ilin per koto. Nia parolo estas difinita nur por tiuj, kiuj provis rilati al nia ideo kun juĝo memstara, sed sub la influo de diversaj aŭditaj

sto того, чтобы болтать разные теоретическія бессмыслицы, открыть глаза и посмотреть! И неужели возможно, чтобы зрѣлые люди постоянно говорили бессмысленныя фразы про какое-то различіе голосовыхъ органовъ у народовъ, когда каждое дитя видѣло на каждомъ шагу членовъ одного народа, прекрасно говорящихъ на языкѣ другого народа!“ И учитель отвѣтитъ: „это дѣйствительно не вѣроятно, но однако это такъ было!“.

Правда, въ настоящее время въ дѣлѣ международного языка рутина и духовная инерція начинаютъ мало по малу уступать здравому благоразумію. Уже давно тамъ и сямъ въ различныхъ газетахъ и обзрѣніяхъ появляются статьи, полныя сочувствія какъ къ самой идеѣ, такъ и къ ея защитникамъ, но статьи эти носятъ еще не рѣшительный характеръ, будто авторы ихъ боятся, что люди могутъ выставить ихъ на публичное осмѣяніе; эти робкіе голоса теряются въ громкомъ хорѣ крикуновъ и насмѣшниковъ, такъ что громадное большинство публики, привыкшей идти только туда, гдѣ наиболѣе громко кричатъ, и считать каждаго насмѣшника мудрецомъ, каждаго нападающаго храбрецомъ и каждаго нападаемаго неправымъ, продолжаетъ до сего времени еще смотрѣть на идею международного языка, какъ на бессмысленную дѣтскую фантазію. Убѣждать эту публику мы не намѣреваемся, потому что всѣ наши слова тутъ пропадаютъ даромъ. Ее убѣдить только время. Завтра она будетъ воздвигать монументы пионерамъ идеи съ тѣмъ же самымъ стаднымъ чув-



opinioj perdis la egalpezon, ne scias, kiel ili devas sin teni, dezirus kredi kaj samtempe turmentigas per konstantaj duboj. Por ili ni tie ĉi analizos la demandon, ĉu efektive ni, la amikoj de la ideo de lingvo internacia, laboras por ia utopio, kaj ĉu minacas al ni la danĝero, ke ĉiuj niaj laboroj pereos vane, kiel kredigas niaj kontraŭuloj, aŭ ĉu ni iras al celo klare difinita, senduba kaj nepre atingota.

Ni scias, estimataj aŭskultantoj, ke vi kutimis rilati kun estimo nur al tiaj argumentoj, kiuj estas plenigitaj per multo da citatoj, traplektitaj per multo da laŭtaj aŭtoritataj nomoj kaj brilas per amasego da alteflugaj kvazaŭ-sciencaj frazoj. Ni avertas vin, ke ĉion tion ĉi vi en nia parolo ne trovos. Se vi trovas atentinda nur tion, kio estas ligita kun laŭtaj nomoj, legu ian verkon pri lingvo internacia, kaj vi trovos tie longan serion da gloraĵoj kaj aŭtoritataj scienculoj, kiuj laboris por la ideo de lingvo internacia. Sed ni tie ĉi forlasos ĉian superfluan balaston kaj parolos al vi nur en la nomo de la nuda logiko. Ne turnu atenton sur tion, kion diras Petro aŭ Johano, sed pripensu mem. Se niaj argumentoj estas ĝustaj, akceptu ilin, — se ili estas malĝustaj, forĵetu ilin, se

stvomъ, съ какимъ сегодня она забрасываетъ ихъ грязью. Наша рѣчь предназначается только для тѣхъ, которые обнаружили желаніе отнестись къ нашей идеѣ съ самостоятельнымъ сужденіемъ, но подъ вліяніемъ разныхъ выслушанныхъ мнѣній потеряли равновѣсіе, не знаютъ, какимъ образомъ они могутъ удержаться, желали бы вѣрить и въ тоже время терзаются постоянными сомнѣніями. Собственно для нихъ мы будемъ производить анализъ вопроса, дѣйствительно ли мы, друзья идеи международного языка, работаемъ для утопіи и дѣйствительно ли намъ угрожаетъ опасность, что всѣ наши труды пропадутъ даромъ, какъ увѣряютъ наши противники, или же мы идемъ къ цѣли, ясно определенной, несомнѣнной и непременно достижимой.

Мы знаемъ, уважаемые слушатели, что вы привыкли относиться съ уваженіемъ только къ тѣмъ аргументамъ, которые исполнены множествомъ цитатъ переплетены множествомъ громкихъ авторитетныхъ именъ и блестятъ массой высокопарныхъ квази-научныхъ фразъ. Мы предупреждаемъ Васъ, что ничего подобнаго въ нашей рѣчи Вы не найдете. Если Вы находите заслуживающимъ вниманія только то, что связано съ громкими именами, прочитайте какой нибудь трудъ о международномъ языкѣ и Вы найдете тамъ длинный рядъ славныхъ и авторитетныхъ ученыхъ, которые работали надъ идеей международного языка. Но мы здѣсь отбросимъ весь излишній балластъ и будемъ говорить Вамъ только именемъ чистой логики. Не обращайтесь на



eĉ miloj da laŭtaj nomoj starus post ili.

Ni analizos sisteme la sekvantajn demandojn: 1) ĉu lingvo internacia estas bezona; 2) ĉu ĝi estas ebla en principo; 3) ĉu ekzistas espero, ke ĝi efektive estos enkondukita praktike; 4) kiam kaj kiamaniere tio ĉi estos farita kaj kia lingvo estos enkondukita; 5) ĉu nia nuna laborado kondukas al ia difinita celo, aŭ ni agas ankoraŭ blinde kaj riskas, ke nia laborado pereos vane, kaj prudentaj homoj devas ankoraŭ sin teni flanke de ni, ĝis „la afero klariĝos“.

## II.

Ĉu lingvo internacia estas bezona? Tiu ĉi demando per sia naiveco elvokos ridon ĉe la estontaj generacioj, tiel same kiel niaj samtempuloj ekridus ekzemple ĉe la demando „ĉu poŝto estas bezona?“ La plimulto de la inteligenta mondo jam nun trovos tiun ĉi demandon tute superflua; tamen pro konsekvenco ni metas tiun ĉi demandon dank al tio, ke ekzistas ankoraŭ multe da homoj, kiuj respondas je tiu ĉi demando per „ne“. La sola motivo, kiun kelkaj el tiuj ĉi homoj elmetas, estas sekvanta: „lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn kaj la naciojn“. Ni konfesas,

то, что говорить Петръ или Иванъ, но руководитесь болѣе собственнымъ своимъ мнѣніемъ. Если наши аргументы справедливы, принимайте ихъ, если они не основательны, отбрасывайте, даже если бы за ними стояла тысяча громкихъ именъ.

Мы будемъ производить систематическій анализъ слѣдующихъ вопросовъ: 1) необходимъ ли международный языкъ; 2) возможенъ ли онъ въ принципѣ; 3) существуетъ ли надежда, что онъ дѣйствительно будетъ введенъ на практикѣ; 4) когда и какимъ образомъ это можетъ случиться и какой именно языкъ будетъ введенъ; 5) приведетъ ли наша настоящая работа къ какой либо опредѣленной цѣли, или мы дѣйствуемъ пока слѣпо, рискуя, что весь нашъ трудъ пропадетъ даромъ, вслѣдствіе чего благоразумныя люди пока должны держаться въ сторонѣ отъ насъ „впредь до выясненія дѣла.“

## II.

Нуженъ ли международный языкъ? Этотъ вопросъ по своей наивности вызоветъ смѣхъ у будущихъ поколѣній, подобно тому, какъ наши современники засмѣялись бы, напримѣръ, надъ вопросомъ „нужна ли почта?“ Большинство интеллигентнаго общества уже и теперь найдетъ этотъ вопросъ совершенно излишнимъ; однако для послѣдовательности мы ставимъ этотъ вопросъ благодаря тому, что существуетъ много людей, которые даютъ на него отрицательный отвѣтъ. Единственный мотивъ, который нѣкоторые изъ этихъ людей выставляютъ, слѣдующій: „международный языкъ раз-



ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo. Sed ni supozu, ke tio ĉi efektive estus io terura, kaj ni rapidos trankviligi tiujn ĉi sinjorojn. Lingvo internacia deziras nur doni al la homoj de malsamaj popoloj, kiuj staras unu antaŭ alia kiel mutuloj, la eblon komprenadi unu alian, sed ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj. Timi, ke lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn, estas tiel same ridinde, kiel ekzemple timi, ke la poŝto, kiu donas al homoj malproksimaj unu de alia la eblon komunikiĝadi, minacas neniigi la buŝajn interparoladojn inter la homoj!

„Lingvo internacia“ kaj „lingvo tutmonda“ estas du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi inter si oni neniel devas. Se ni supozus, ke fariĝos iam kunfluiĝo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon, en tiu ĉi „malfeliĉo“ (kiel nomos ĝin la naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo internacia, sed la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj. Tiam efektive la lingvo internacia faciligos al la homoj la atingon de tio, kio antaŭe estos principe decidita de ill kiel dezirinda; sed se la celado al kunfluiĝo ne naskiĝos ĉe la homoj memstare, la lingvo internacia per si mem certe ne volos altrudi al la homoj tian unuiĝon. Lasante tute flanke la demandon pri la dezirindeco aŭ nedezirindeco de nacia ŝovinismo, ni notos nur tion, ke cela-

рушить языки национальные и самая нация“. Мы признаемся, что сколько мы не ломали себѣ голову, мы никакъ не могли понять, въ чемъ именно будетъ заключаться несчастье человечества, если бы въ одинъ прекрасный день оказалось, что болѣе уже не существуетъ ни национальныхъ языковъ, ни націй, а существуетъ только одна общечеловѣческая семья съ однимъ общечеловѣческимъ языкомъ. Но мы предполагаемъ, что изъ этого дѣйствительно получится нѣчто ужасное, а потому сгѣшимъ успокоить этихъ господъ. Международный языкъ желаетъ только дать людямъ разныхъ народностей, относящимся другъ къ другу какъ нѣмые, возможность взаимнаго пониманія, но онъ нисколько не намѣренъ вмѣшиваться во внутреннюю жизнь народовъ. Бояться что международный языкъ уничтожитъ национальные языки, точно такъ же смѣшно, какъ, на примѣръ, бояться, что почта, которая даетъ возможность сообщаться людямъ, живущимъ другъ отъ друга въ отдаленіи, угрожаетъ уничтоженіемъ устныхъ разговоровъ между людьми! „Языкъ международный“ и „языкъ всемирный“ представляютъ изъ себя два разнородныхъ понятія, которыя никакъ нельзя между собою смѣшивать. Если мы предположили бы, что когда либо произойдетъ смѣшеніе людей въ одинъ общечеловѣческой народъ, въ этомъ „несчастьи“ (какъ называютъ это национальные шовинисты) будетъ виновать не международный языкъ, но слившіеся убѣжденія и взгляды людей. Тогда дѣйствительно международный языкъ облегчитъ людямъ достиженіе того, что напередъ будетъ



don al lingvo internacia ne devas escepti eĉ la plej varmega blinda ŝovinismo; ĉar la rilato inter celado al lingvo internacia kaj inter nacia ŝovinismo estas tia sama, kiel inter nacia patriotismo kaj amo al sia familio: Per si mem la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado: dank'al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedus perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝigante unuj kun la aliaj, ĉiam pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon; sed kiam ĉiu el ni devos ellernadi nur unu fremdan lingvon (kaj ankoraŭ tre facilan), ĉiu el ni havos la eblon ellerni sian lingvon fonde, kaj ĉiu lingvo, liberiĝinte de la premado de multaj najbaraj kaj konservinte plene por si sola ĉiujn fortojn de sia popolo, disvolviĝos baldaŭ plej potence kaj brile.

ими принципиально рѣшено, какъ нѣчто желательное; но если стремление къ слиянію не родится у людей самостоятельно, международный языкъ самъ по себѣ конечно не пожелаетъ навязывать людямъ такое соединеніе. Оставляя совсѣмъ въ сторонѣ вопросъ о желательности или нежелательности національнаго шовинизма, мы замѣтимъ только, что стремленія къ международному языку не должны исключать даже самыя горячій и слѣпой шовинизмъ, ибо отношеніе между стремленіемъ къ международному языку и между національнымъ шовинизмомъ существуетъ тоже самое, какое имѣетъ мѣсто между національнымъ патриотизмомъ и любовью къ своей семьѣ. Самъ по себѣ международный языкъ не только не можетъ подорвать національные языки, но напротивъ, онъ безъ сомнѣнія долженъ привести къ ихъ большому развитію и полному расцвѣту; благодаря необходимости изучать нѣсколько чужихъ языковъ, теперь рѣдко можно встрѣтить людей, которые въ совершенствѣ владѣли бы своимъ отечественнымъ языкомъ и сами языки, постоянно сталкиваясь другъ съ другомъ, все болѣе и болѣе смѣшиваются между собой, уродуются и теряютъ свою натуральную свѣжесть и прелесть; но когда каждый изъ насъ обязанъ будетъ изучать одинъ только иностранный языкъ (и при томъ очень легкій), то мы будемъ имѣть возможность изучать свой языкъ основательно и всякій языкъ, освободившись отъ вліянія многихъ сосѣднихъ и сохранивши вполне для самого себя всѣ силы своего народа, скоро разовьется наиболѣе могущественно и блестяще.



La dua motivo, kiun elmetas la malamikoj de lingvo internacia, estas la timo, ke kiel lingvo internacia estos eble elektita ia el la lingvoj naciaj kaj ke tiam la homoj ne alproksimiĝos al si reciproke, sed simple ia unu popolo dispremos kaj englutos ĉiujn aliajn popolojn, dank' al la grandega superforto, kiun ĝi ricevos super ĉiuj aliaj popoloj. Tiu ĉi motivo estas ne tute senfundamenta; sed ĝi povas esti elmetita nur kontraŭ tia aŭ alia nepripensita kaj malĝusta formo de lingvo internacia. Tiu ĉi motivo kompreneble perdas ĉian signifon, se ni turnos atenton, ke lingvo internacia povas esti kaj estos nur ia neŭtrala lingvo, kiel ni malsupre montros.

Sekve se ni lasos por kelka tempo flanke la demandon pri la ebleco aŭ neebleco de la enkonduko de lingvo internacia (pri tiu ĉi punkto ni parolos malsupre), se ni supozos, ke la enkonduko de tia lingvo dependas nur de nia deziro, kaj se ni esceptos ian kriantan erarparŝon en la elekto de la lingvo, ĉiu devas konsenti, ke pri malutilo de lingvo internacia neniel povas esti eĉ la plej malgranda parolo. Sed la utilo, kiun tia lingvo alportus al la mondo, estas tiel grandega kaj videbla por ĉiu, ke pri tio ĉi ni propre ne bezonus paroli. Tamen kelke da vortoj ni diros pri tio ĉi, se eĉ simple pro pleneco de nia analizo.

Другимъ мотивомъ, который выставляютъ враги международного языка, служитъ боязнь, что въ качествѣ международного языка можетъ быть выбранъ какой нибудь изъ національныхъ языковъ и что тогда люди не сблизятся между собой взаимно, но какой нибудь одинъ народъ раздавить и поглотить всѣ прочіе народы благодаря громадному превосходству, которое онъ пріобрѣтетъ надъ всѣми другими народами. Этотъ мотивъ имѣетъ болѣе основательности, но онъ можетъ быть выставленъ только противъ той или иной необдуманной и неудачной формы международного языка, Этотъ мотивъ, понятно, теряетъ всякое значеніе, если мы обратимъ вниманіе на то, что языкомъ международнымъ можетъ быть и будетъ только какой нибудь нейтральный языкъ, какъ мы это покажемъ ниже.

Слѣдовательно, если мы на нѣкоторое время оставимъ въ сторонѣ вопросъ о возможности или невозможности введенія международного языка (о чемъ мы будемъ говорить ниже), если предположимъ, что введеніе этого языка зависитъ только отъ нашего желанія, и если исключимъ какой нибудь выдающійся ложный шагъ при выборѣ этого языка, то каждый долженъ согласиться, что о бесполезности международного языка не можетъ быть и рѣчи. Польза же, которую этотъ языкъ могъ бы принести міру, такъ велика и для всѣхъ очевидна, что про это не стоило бы и говорить. Однако мы скажемъ нѣсколько словъ и про это, хотя бы только для полноты нашего анализа.



Ĉu vi ekpensis iam pri tio, kio propre levis la homaron tiel neatingeble alte super ĉiuj aliaj bestoj, kiuj ja en efektiveco estas konstruitaj laŭ tiu sama tipo, kiel la homo? La tutan nian altan kulturon kaj civilizacion ni dankas nur al unu objekto: al la posedado de lingvo, kiu ebligis al ni la interŝanĝadon de pensoj. Kio estus kun ni, fieraj reĝoj de la mondo, se ni ne povus lingve komunikiĝadi unuj kun aliaj, se sian tutan scion kaj inteligentecon ĉiu el ni devus de la komenco mem ellaboradi al si mem, anstataŭ faradi uzon—dank' al interŝanĝo de pensoj—de la jam pretaj fruktoj de la sperto kaj diversaj scioj de tutaj miljaroj, de tutaj milionoj kaj miliardoj da aliaj similaj al ni kreitaĵoj? Ni tiam eĉ per unu plej malgranda ŝtupeto ne starus pli alte ol tiuj diversaj bestoj, kiuj nin ĉirkaŭas kaj kiuj estas tiel sensaĝaj kaj senhelpaj! Forprenu de ni la manojn kaj la piedojn kaj kion vi volas, sed lasu al ni nur la povadon interŝanĝadi la pensojn,—kaj ni restos tiuj samaj reĝoj de la naturo kaj ni konstante kaj senfine perfektigados; sed donu al ĉiu el ni eĉ centon da manoj, donu al ni eĉ centon da diversaj ĝis nua ne konataj sentoj kaj povoj, sed forprenu de ni la povon de interŝanĝado de pensoj—kaj ni restos sensaĝaj kaj senhelpaj bestoj. Sed se la tre neplena kaj tre limigita ebleco de interŝanĝo de pensoj havis por la homaron tian grandegan signifon, ekpensu pri tio, kian grandegan kaj kunnenio kompareblan utilon donus al la homaro tiu lingvo, kiu farus la interŝanĝadon de pensoj plena, kaj dank' al kiu ne sole A havus la

Думали ли Вы когда либо про то, что собственно подняло человека на такую недостижимую высоту сравнительно с другими животными, которые в действительности созданы по тому же самому типу, как и человек? Всеи нашей высокой культурой и цивилизацией мы обязаны единственно одному: обладанию даром слова, который сделал возможным для нас обмен мыслей. Что было бы с нами, гордыми царями природы, если бы мы не могли словесно сообщаться друг с другом, если бы всякое знание и понятие каждый из нас обязан был вырабатывать своими собственными силами с самого начала, вместо того, чтобы пользоваться, благодаря обмену мыслей—уже готовыми плодами опыта и различных знаний всех тысячелетий, всех миллионов и миллиардов других подобных нам существ? Мы тогда даже одной самой маленькой ступенью не стояли бы выше, чем те различные животные, которые нас окружают и которые так неразумны и беспомощны! Отнимите от нас руки и ноги и что вам угодно, но оставьте нам только возможность обмениваться мыслями—и мы останемся теми же царями природы и будем постоянно и бесконечно усовершенствоваться; но дайте каждому из нас сотню рук, дайте нам даже сотню различных до сего времени неизвестных чувств и способностей, лишь отнимите от нас возможность обмена мыслей—и мы останемся неразумными и беспомощными животными. Но если очень неполная и очень ограниченная возможность об-



eblon kompreniĝadi kun B, C kun D, E kun F, sed ĉiu el ili povus kompreniĝadi kun ĉiu el la aliaj! Tuta cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia! Ni prenu kelkajn malgrandajn ekzemplojn. Ni penas tradukadi la verkojn de ĉiu nacio en la lingvojn de ĉiuj aliaj nacioj; sed tio ĉi englutas ja neproduktive grandegan multon da laboroj kaj mono kaj tamen malgraŭ ĉio ni povas traduki nur la plej signifikantan parton de la homa literaturo, kaj la grandega plimulto de la homa literaturo kun riĉaj provizoj da diversaj pensoj por ĉiu el ni restas neakirebla. Sed kiam ekzistus lingvo internacia, tiam ĉio, kio aperas en la regiono de la homa penso, etus tradukata nur en tiun ĉi unu neŭtralan lingvon kaj multaj verkoj etus skribataj rekte en tiu ĉi lingvo, kaj ĉiuj produktoj de la homa spirito fariĝus akireblaj por ĉiu el ni. Por la perfektigado de tiu aŭ alia branĉo de la homaj scioj ni aranĝas sur ĉiu paŝo internaciajn kongresojn,—sed kian mizeran rolon ili ludas, kiam partopreni en ili povas ne tiu, kiu efektive kun utilo dezirus ion aŭdi, ne tiu, kiu efektive ion gravan volus komuniki, sed nur tiu, kiu scias babiladi en kelkaj lingvoj. Nia vivo estas mallonga kaj la scienco estas vasta; ni devas lerni, lerni! Al la lernado ni povas dediĉi nur parton de nia mallonga vivo, nome niajn infanajn kaj junulajn jarojn; sed ho ve! granda parto de tiu ĉi kara tempo foriras tute neproduktive por la ellernado de lingvoj! Kiom multe

мѣна мыслей имѣеть для человѣчества такое громадное значеніе, то вы можете себѣ представить, какую громадную и ни съ чѣмъ не сравнимую пользу принесъ бы человѣчеству тотъ языкъ, который дѣлалъ бы обмѣнъ мыслей всеобщимъ и благодаря которому не только А имѣлъ бы возможность взаимно понимать B, C—D, E—F, но каждый изъ нихъ могъ бы свободно объясниться со всѣми прочими людьми! Цѣлая сотня самыхъ великихъ изобрѣтеній не произведетъ въ жизни человѣчества такого громаднаго и благодѣтельнаго переворота, какой сдѣлаетъ введеніе международного языка! Мы возьмемъ нѣсколько небольшихъ примѣровъ. Мы стараемся переводить сочиненія каждой націи на языки другихъ націй; но это поглощаетъ громадное количество труда и денегъ и однако, несмотря на все, мы можемъ перевести лишь самую незначительную часть чело-вѣческой литературы, громадное же количество произведеній чело-вѣческаго ума съ богатымъ запасомъ разнообразныхъ мыслей остается для каждаго изъ насъ недоступнымъ. Когда же будетъ существовать международный языкъ, тогда все, что появляется въ области чело-вѣческой мысли будетъ переводиться на одинъ этотъ нейтральный языкъ, и многіе труды будутъ писаться прямо на этомъ языкѣ и такимъ образомъ всѣ произведенія чело-вѣческаго духа сдѣлаются доступными для каждаго изъ насъ. Для усовершенствованія той или иной отрасли чело-вѣческаго знанія мы собираемъ на каждомъ шагѣ международные конгрессы,—но какую жалкую роль они играютъ, ког-



ni gajnus, se, dank' al ekzistado de lingvo internacia, ni povus la tutan tempon, dediĉatan nun al la neproduktiva lernado de lingvoj, dediĉi al la lernado de efektivaj kaj pozitivaj sciencoj! Kiel alte tiam levigus la homaro!...

не забывает даже и въ случаѣ долгаго неупотребленія его. 4) Эсперанто уже съ самаго начала очень легкокъ для словеснаго употребленія, въ то время какъ въ Воляпюкѣ должны очень долго и терпѣливо упражнять свое ухо, пока не привыкнутъ къ ясному различенію многихъ очень сходно звучащихъ словъ (напр. bar, rab, rap, röp, pep, röp, reb, böb, bob, pop, pup, bub, rub, rüb, bib, pip, püp и т. д., которые дѣлаются еще болѣе сходными между собой, если употребляютъ ихъ во множественномъ числѣ, т. е. съ „s“ на концѣ). 5) Въ Воляпюкѣ благодаря нѣсколькимъ основнымъ ошибкамъ въ принципахъ конструкціи (напр. гласныя въ началѣ или концѣ слова не могутъ быть употребляемы, ибо они суть знаки грамматическіе), всякое слово непременно должно быть создано авторомъ (даже всѣ имена собственные, напр. Америка=Melop, Anglujo=Nelij). Это даетъ не только громадное число совершенно излишнихъ словъ для изученія, но дѣлаетъ каждый развивающійся шагъ языка постоянно зависящимъ отъ его автора или отъ какой либо завѣдующей этимъ Академіи. Между тѣмъ какъ въ Эсперанто, благодаря полному отсутствію вліянія грамматики на словарь и благодаря правилу, что всѣ иностранныя слова, которые уже сами по себѣ интернаціональны, употребляются безъ измѣненія подобно тому, какъ и въ другихъ языкахъ—не только громадное количество словъ дѣлается совершенно не нужнымъ для изученія, но языкъ получаетъ возможность постоянно все болѣе и болѣе развиваться, внѣ всякой зависимости отъ автора или какой либо Академіи.



Parolante pri la pliboneco de Esperanto antaŭ Volapük, ni tute ne intencas per tio ĉi malgrandigi la meritojn de la elpensinto de Volapük. La meritoj de Schleyer estas grandegaj kaj lia nomo ĉiam staros sur la plej honora loko en la historio de la ideo de lingvo internacia. Ni volis nur montri, ke se hodiaŭ efektiviĝus kongreso por la elekto de lingvo internacia, tiam ĝi inter la ambaŭ nun ekzistantaj lingvoj artaj ne povus ŝanceliĝi eĉ unu minuton.

Ni pruvis sekve, ke se hodiaŭ efektiviĝus kongreso por la elekto de lingvo internacia, tiam malgraŭ la grandega nombro da ekzistantaj lingvoj ni povus jam nun kun plena certeco kaj precizeco antaŭvidi, kian lingvon ĝi elektos, nome: el ĉiuj ekzistantaj lingvoj vivaj, mortintaj kaj artaj la kongreso povas elekti sole nur unu lingvon: Esperanto. Kia ajn estus la konsisto de la kongreso, kiaj ajn estus la politikaj kondiĉoj, je kiaj ajn konsideroj, antaŭjuĝoj, simpatioj aŭ antipatioj la kongreso sin gvidus, ĝi absolute ne povus elekti ian alian lingvon krom Esperanto, ĉar por la rolo de lingvo internacia Esperanto estas nun la sola kandidato en la tuta mondo, la sola, tute sen iaj konkurantoj. Ĉar eĉ ĉe la plej malprospera konsisto de la kongreso en ĝi tamen sidos homoj pensantaj, kaj la grandega pliboneco de la lingvo Esperanto antaŭ ĉiuj aliaj lingvoj tro forte falas en la okulojn al ĉiu, kiu almenaŭ iom konatiĝis kun tiu ĉi lingvo, tial estas tute ne eble

Говоря относительно преимуществъ Эсперанто предъ Воляпюкомъ, мы вовсе не желаемъ этимъ самымъ уменьшать заслуги автора послѣдняго. Заслуги Шлейера велики и его имя всегда будетъ стоять на самомъ почетномъ мѣстѣ въ исторіи идеи международного языка. Мы желали только показать, что если бы въ настоящее время осуществился бы конгрессъ для избранія международного языка, то онъ въ дѣлѣ избранія одного изъ двухъ существующихъ международныхъ искусственныхъ языковъ не могъ бы поколебаться ни на минуту.

Такимъ образомъ мы доказали, что если бы сегодня же осуществился конгрессъ для избранія международного языка, тогда, не смотря на громадное число существующихъ языковъ, мы могли бы уже теперь съ полной точностью и увѣренностью предвидѣть, какой языкъ онъ выберетъ, а именно: изъ всѣхъ существующихъ живыхъ, мертвыхъ и искусственныхъ языковъ конгрессъ можетъ избрать только одинъ языкъ: Эсперанто. Какой бы ни былъ составъ конгресса, какія бы ни были политическія условія, какими бы разсужденіями, предположеніями, симпатіями или антипатіями конгрессъ ни руководился, онъ абсолютно не могъ бы избрать другого языка, кромѣ Эсперанто, ибо для роли международного языка Эсперанто пока представляется единственнымъ кандидатомъ во всемъ свѣтѣ, единственнымъ, безъ всякихъ конкурентовъ. Ибо даже при самомъ неудачномъ составѣ конгресса въ немъ все-таки будутъ находиться здраво-



supozi, ke la kongreso elektos ian alian lingvon. Se tamen, kontraŭ ĉia atendo, la kongreso estos tiom blindigita, ke ĝi ekdeziros ian alian lingvon, tiam—kiel ni pruvis supre—la vivo mem zorgos pri tio, ke la decido de la kongreso restu sole malviva litero, tiel longe, ĝis kolektiĝos nova kongreso kaj faros elekton ĝustan.

## VII.

Nun restas al ni respondi ankoraŭ unu lastan demandon, nome: En la nuna minuto Esperanto, vere, aperas kiel sola kandidato por lingvo internacia; sed ĉar kongreso de reprezentantoj de diversaj regnoj por la elekto de lingvo internacia efektiviĝos kredeble ankoraŭ ne baldaŭ, eble post dek kaj eble post cent jaroj, tre povas ja esti, ke ĝis tiu tempo aperos multaj novaj artaj lingvoj, kiuj staros multe pli alte ol Esperanto, kaj sekve unu el ili devos esti elektita de la kongreso? Aŭ eble la kongreso mem aranĝos kompetentan komitaton, kiu okupos sin je la kreo de nova arta lingvo?

Je tio ĉi ni povas respondi jenon. La ebleco de apero de nova lingvo

мыслящие люди и при томъ громадное преимущество языка Эсперанто предъ всѣми другими языками слишкомъ ярко бросается въ глаза каждому, кто хоть сколько нибудь ознакомился съ этимъ языкомъ, такъ что совершенно невозможно предположить, что конгрессъ изберетъ какой либо другой языкъ. Если же, противъ всякаго ожиданія, конгрессъ будетъ на столько ослѣпленъ, что пожелаетъ избрать какой либо другой языкъ, тогда, какъ мы доказали выше, — жизнь сама позаботится о томъ, чтобы рѣшеніе конгресса осталось мертвой буквой до тѣхъ поръ, пока не соберется новый конгрессъ и не сдѣлаетъ соотвѣтствующаго выбора.

## VII.

Теперь остается отвѣтить еще на послѣдній вопросъ, а именно: въ настоящую минуту Эсперанто, правда, является единственнымъ кандидатомъ стать международнымъ языкомъ; но такъ какъ конгрессъ представителей разныхъ странъ для избранія международного языка осуществится, вѣроятно, еще не скоро, возможно черезъ десять, возможно чрезъ сто лѣтъ, очень можетъ быть, что къ тому времени появится много новыхъ искусственныхъ языковъ, которые будутъ стоять гораздо выше, чѣмъ Эсперанто, такъ что одинъ изъ нихъ и будетъ выбранъ конгрессомъ? Или возможно, что конгрессъ самъ составитъ компетентный комитетъ, который займется созданиемъ новаго искусственнаго языка?

На это мы можемъ отвѣтить слѣдующее. Возможность появленія но-



per si mem estas tre duba, kaj komisii al komitato la kreadon de nova lingvo estus tiel same sence, kiel ekzemple komisii al komitato verki bonan poemon. Ĉar la kreado de plena, en ĉiuj rilatoj taŭga kaj vivipova lingvo, kiu al multaj ŝajnas tia facila kaj ŝerca afero, en efektiveco estas afero tre kaj tre malfacila. Ĝi postulas de unu flanko specialan talenton kaj inspiron kaj de la dua flanko grandegan energion, paciencon kaj varmegan, senfine aldonitan amon al la entreprenita afero. Multajn niaj vortoj tre mirigos, ĉar ŝajnas al ili, ke oni bezonas nur decidi al si, ke tablo ekzemple estos „bam“, seĝo estos „bim“ k. t. p. k. t. p., kaj lingvo jam estos preta. Kun la kreado de pleneca, taŭga kaj vivipova lingvo estas tute tiel same, kiel ekzemple kun la ludado sur fortepiano aŭ kun la trairado de densega arbaro. Al homo, kiu ne konas la esencon de muziko, ŝajnas, ke nenio estas pli facila, ol ludi fortepianon, — oni ja bezonas nur ekfrapi unu klavon, kaj estos ricevita tono, vi ekfrapos alian klavon kaj vi ricevos alian tonon, — vi frapados en la daŭro de tuta horo diversajn klavojn, kaj vi ricevos tutan kompozicion... Ŝajnas, ke nenio estas pli facila; sed kiam li komencas iudi sian improvizitan kompozicion, ĉiuj kun ridego diskuras, kaj eĉ li mem, aŭdante la ricevatajn de li sovaĝajn sonojn, baldaŭ komencos komprenetadi, ke la afero iel estas ne glata, ke muziko ne konsistas en sola frapado de klavoj, — kaj tiu heroo, kiu kun tia memfida mieno sidigis antaŭ la fortepiano, fanfaronante, ke li ludos

vaĝo lingvo sama po sebf somnitylna i poruchaty komitety sozdany novago yazyka takzhe bezsmyslenno, kak porucheny komitety sostavleny horoshey poemy. Ibo hozya sozdany plenaĝo, vo vsyx otnošeniyx ĝodnago i žiznesposobnago yazyka, mnogimx i predstavlyetsya legkimx i ŝutočnymx, no vx dŕjstvitylnosti eto sozdany esty dŕlo očenx i očenx trudnoe. Ono trebuyet sx odnoy stony specialnago talanta i pryzvanya, a sx drugoy — ĝromadnoy energiy, terpŕny, i ĝorachey, bezkonечно predannoj lyubvy kx predprinyatomu dŕlu. Mnogix nashy slova očenx udivyatx, ibo imx kažetsya, čto nužno tolyko rŕŕity sebf, čto stolx budet naxp. „bam“, stulx „bim“ i t. d. i t. d. i yazykx budet uže ĝotovx. Sx sozdanyemx plenaĝo, ĝodnago i žiznesposobnago yazyka prorysčoditx tože samoe, čto, naxp., i sx igroy na fortepnyano ili sx proħozhdeniemx črezx ĝustoy lŕsx. Čelovyku, kotoryy ne znayet suščnosti muzyky, kažetsya, čto ničego nŕtŕ legče, kak igratx na fortepnyano — nužno tolyko udarytŕ po klavyšu i polučytŕ odinx tonx, udaryete vy po drugomu klavyšu, polučayete drugoy tonx, vy budete udaryatŕ vx tečeniy časa po različnymx klavyšamx i vy polučyte čŕlyu kompozicyu... kažetsya, čto ničego nŕtŕ legče; no koda načynetsya razyĝryvaney takoy kompozicyy, vsŕ so smŕxomx razbŕĝayotŕsya, i daže samx igroyuščy, slŕŕna polučayemye imx dykye zvuky, skoro načynayet ponymatŕ, čto dŕlo nŕskolyko ne ladno, čto muzyka ne zaključayetsya vx odnomx udareniy po



pli bone ol ĉiuj, kun honto forkuras kaj jam plu ne montras sin antaŭ la publiko. Al homo, kiu neniam estis en granda arbaro, ŝajnas, ke nenio estas pli facila, ol trairi arbaron de unu fino ĝis la dua: „kio da artifika tie ĉi estas? ĉiu infano ja povas tion ĉi fari; oni bezonas nur eniri, iri ĉiam rekte antaŭen, — kaj post kelke da horoj aŭ post kelke da tagoj vi trovos vin en la kontraŭa fino de la arbaro“. Sed apenaŭ li eniris iom en la profundajon de la arbaro, li baldaŭ tiel perdas la vojon, ke li aŭ tute ne povas elrampi el la arbaro, aŭ post longa vagado li eliras, sed tute, tute ne en tiu loko, kie li eliri devis. Tiel estas ankaŭ kun arta lingvo: entrepreni la kreadon de lingvo, doni al ĝi jam antaŭe nomon, trumpeti pri ĝi al la leganta mondo — ĉio tio ĉi estas tre facila, — sed feliĉe fini tiun ĉi laboron estas tute ne tiel facile. Kun memfida mieno multaj entreprenas tian laboron; sed apenaŭ ili iom enprofundiĝis en ĝin, ili aŭ ricevas senordan kolekton da sonoj sen ia difinita plano kaj sen ia indo, aŭ ili puŝiĝas je tiom da malhelpoj, je tiom da reciproke kontraŭparolantaj postuloj, ke ili perdas ĉian paciencon, ĵetas la laboron kaj jam plu ne montras sin antaŭ la publiko.

Ke la kreado de taŭga kaj vivipova lingvo ne estas tiel facila afero,

клавишамъ, — и тотъ герой, который съ такой самодовольной миной сядилъ предъ фортепяно, хвастаясь, что онъ будетъ играть лучше, чѣмъ всѣ, со стыдомъ удалится и уже болѣе не покажется предъ публикой. Человѣку, который никогда не бывалъ въ большомъ лѣсу, кажется, что ничего нѣтъ легче, какъ пройти лѣсъ съ одного конца до другого: „что хитраго заключается въ этомъ? каждый ребенокъ можетъ это сдѣлать; нужно только войти, идти прямо впередъ, и послѣ нѣсколькихъ часовъ или послѣ нѣсколькихъ дней вы окажетесь на противоположномъ концѣ лѣса“. Но едва онъ войдетъ въ глубину лѣса, онъ скоро такъ потеряетъ дорогу, что или совсѣмъ не выйдетъ изъ лѣсу или если и выйдетъ послѣ долгаго плутанія, но совсѣмъ въ другомъ мѣстѣ, гдѣ онъ долженъ былъ выйти. Точно также и съ искусственнымъ языкомъ: предпринять созданіе языка, дать ему напередъ имя, протрубить про него читающему міру — все это очень легко, но счастливо окончить этотъ трудъ уже совсѣмъ не такъ легко. Многие предпринимаютъ этотъ трудъ съ самой самодовольной миной; но едва они начинаютъ нѣсколько углубляться въ него, какъ уже у нихъ получается безпорядочная коллекція звуковъ безъ всякаго опредѣленнаго плана и качества, или же они наталкиваются настолько трудностей, настолько взаимно-противорѣчащихъ требованій, что теряютъ всякое терпѣніе, бросаютъ работу и уже болѣе не показываются предъ публикой.

Что созданіе пригоднаго и жизнеспособнаго языка не есть такое



kiel al multaj ŝajnas, oni povas interalie la plej bone vidi el la sekvanta fakto: oni scias, ke ĝis la apero de Volapük kaj Esperanto estis grandega multo da diversaj provoj krei artan lingvon internacian; ne malmulte da provoj aperis ankaŭ post la apero de la diritaj du lingvoj; grandegan serion da nomoj de tiuj ĉi provoj kaj iliaj aŭtoroj vi trovos en ĉia historio de la ideo de lingvo internacia; tiuj ĉi provoj estis farataj kiel de privataj personoj, tiel ankaŭ de tutaj societoj; ili englutis grandegan multon da laboroj kaj kelkaj el ili englutis ankaŭ tre grandajn kapitalojn;—kaj tamen el tiu ĉi tuta grandega nombro nur du, sole nur du atingis efektiviĝon kaj trovis adeptojn kaj praktikan uzon! Sed ankaŭ tiuj ĉi du aperis nur okaze, dank'al tio, ke unu el la aŭtoroj ne sciis pri la laborado de la dua. La aŭtoro de la lingvo Esperanto, kiu dediĉis al sia ideo sian tutan vivon, komenante de la plej frua infaneco, kiu kun tiu ĉi ideo kunkreskiĝis kaj estis preta ĉion oferi al ĝi, konfesas mem, ke lian energion subtenadis nur tiu konscio, ke li kreas ion tian, kio ankoraŭ neniam ekzistis, kaj ke la malfacilaĵoj, kiujn li renkontadis en la daŭro de sia laborado, estis tiel grandaj kaj postulis tiom multe da pacienco, ke se Volapük estus aperinta 5—6 jarojn pli frue, kiam Esperanto ne estis ankoraŭ finita, li (la aŭtoro de Esperanto) certe perdus la paciencon kaj rifuzus la pluan laboradon super sia lingvo, malgraŭ ke li tute bone konsciis la grandegan plibonecon de sia lingvo antaŭ Volapük.

легкое дѣло, какъ оно кажется многимъ, это можно видѣть наилучшимъ образомъ изъ слѣдующаго факта: извѣстно, что до появленія Воляшюка и Эсперанто было громадное количество разныхъ попытокъ создать искусственный международный языкъ; не мало попытокъ появилось также и послѣ обнаруженія названныхъ двухъ языковъ; длинный рядъ названій этихъ попытокъ и ихъ авторовъ вы найдете во всякой исторіи идеи международного языка, такія попытки дѣлались какъ частными лицами, такъ и цѣлыми обществами; онѣ поглотили громадное количество трудовъ, а нѣкоторыя также и капиталовъ; и однако изъ всего этого громаднаго числа только два, единственно только два достигли осуществленія и нашли себѣ adeptовъ и практическое употребленіе. Но и эти два появились только случайно, благодаря тому, что одинъ изъ авторовъ не зналъ про трудъ другого. Авторъ языка Эсперанто, который посвятилъ своей идеѣ всю свою жизнь, начиная съ ранняго дѣтства, который со своей идеей сросся и былъ готовъ принести ей въ жертву все, признается самъ, что его энергію поддерживало лишь сознание, что онъ создаетъ нѣчто такое, что еще не существовало никогда и что трудности, которыя онъ встрѣчалъ въ продолженіи своего труда, были такъ велики и требовали такъ много терпѣнія, что если бы Воляшюкъ появился 5—6 годами ранѣе, когда Эсперанто не былъ еще оконченъ, онъ (авторъ Эсперанто) конечно потерялъ бы терпѣніе и отказался бы отъ дальнѣйшей работы надъ своимъ



El ĉio supredirita vi komprenos, ke nun, kiam la tuta mondo scias, ke du tute plenaj artaj lingvoj jam longe ekzistas, estas tre dube, ke troviĝu iu, kiu entreprenus nun similan Sizifan laboron de la komenco kaj havus sufiĉe da energio, por alkonduki ĝin al feliĉa fino, tiom pli ke lin ne vigligus la espero doni iam ion pli bonan ol tio, kio jam ekzistas. Kiom malmulte da espero havus tia entreprenanto, oni vidas la plej bone el tiuj tre multaj provoj kaj projektoj, kiuj aperis post Esperanto: malgraŭ ke la aŭtoroj havis antaŭ si jam tute pretan modelon, laŭ kiu ili povis labori, neniam el tiuj ĉi provoj ne sole ne eliris el la regiono de projektoj, sed eĉ jam el tiuj ĉi projektoj mem oni klare vidas, ke se iliaj aŭtoroj, havus la paciencon kaj povon alkonduki ilin ĝis fino tiuj ĉi laboroj prezentiĝus ne pli bone, sed kontraŭe, multe malpli bone ol Esperanto. Dum Esperanto bonege kontentigas ĉiujn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo internacia (eksterordinara facileco, precizeco, riĉeco, natureco, vivipoveco, fleksebleco, sonoreco k. t. p.), ĉiu el tiuj projektoj penas plibonigi unu ian flankon de la lingvo, oferante por tio ĉi kontraŭvole ĉiujn aliajn flankojn. Tiel ekzemple multaj el la plej novaj projektistoj uzas la sekvantan ruzadon: sciante, ke la publiko taksos ĉiun projekton konforme al tio, kiel al ĝi rilatos la instruitaj lingvistoj, ili zorgas ne pri tio,

языкомъ, не смотря на то, что онъ отлично сознавалъ громадное преимущество своего языка надъ Воляшюкъ.

Изъ всего вышесказаннаго Вы поймете, что теперь, когда весь миръ знаетъ, что два совершенно полные искусственные языка уже давно существуютъ, очень сомнительно, чтобы нашелся еще ктонибудь, который предпринялъ бы подобную Сизифову работу съ начала и имѣлъ бы достаточно энергии, чтобы привести ее къ счастливому концу, а тѣмъ болѣе, что его не можетъ ослѣплять надежда дать что-либо болѣе лучшее того, что уже существуетъ. Какъ мало надежды имѣлъ бы такой предприниматель, можно хорошо видѣть изъ тѣхъ многочисленныхъ попытокъ и проектовъ, которые появлялись послѣ Эсперанто: не смотря на то, что авторы ихъ имѣли уже предъ собой готовую модель, по которой они могли работать, ни одна изъ этихъ попытокъ не только не вышла изъ области проектовъ, но уже изъ этихъ самыхъ проектовъ хорошо видно, что если бы ихъ авторы имѣли терпѣние и возможность довести ихъ до конца, то труды ихъ оказались бы гораздо менѣе удовлетворительны, чѣмъ Эсперанто. Въ то время, какъ Эсперанто удовлетворяетъ всѣмъ требованіямъ, какія могутъ быть предъявлены къ международному языку (необыкновенная легкость, точность, богатство, естественность, жизнеспособность, гибкость, звучность и т. д.), всѣ изъ этихъ проектовъ стремятся къ улучшенію лишь какойнибудь одной стороны языка, невольно жер-



ke ilia projekto estu efektive taŭga por io en la praktiko, sed nur pri tio, ke ĝi en la unua minuto faru bonan impreson sur la lingvistojn; por tio ili prenas siajn vortojn preskaŭ tute sen ia ŝanĝo el la plej gravaj jam ekzistantaj lingvoj naturaj. Ricevinte frazon skribitan en tia projektita lingvo, la lingvistoj rimarkas, ke ili per la unua fojo komprenis tiun ĉi frazon multe pli facile ol en Esperanto,—kaj la projektistoj jam triumfas kaj anoncas, ke ilia „lingvo“ (se ili iam finos ĝin) estos pli bona ol Esperanto. Sed ĉiu prudenta homo tuj konvinkiĝas, ke tio ĉi estas nur iluzio, ke al la malgrava principo, elmetita pro montro kaj allogo, tie ĉi estas oferitaj la principoj plej gravaj (kiel ekzemple la facileco de la lingvo por la nekleruloj, fleksebleco, riĉeco, precizeco k. t. p.), kaj ke se simila lingvo eĉ povus esti iam finita, ĝi en la fino absolute nenion donus! Ĉar se la plej grava merito de lingvo internacia konsistus en tio, ke ĝi kiel eble plej facile estu tuj komprenata de la instruitaj lingvistoj, ni ja por tio ĉi povus simple preni ian lingvon, ekzemple la latinan, tute sen iaj ŝanĝoj,—kaj la instruitaj lingvistoj ĝin ankoraŭ pli facile komprenos per la unua fojo! La principo de kiel eble plej malgranda ŝanĝado de la naturaj vortoj ne sole estis bone konata al la aŭtoro de la lingvo Esperanto, sed ĝuste de li la novaj projektistoj ja prenis tiun ĉi principon: sed dum Esperanto prudente kontentigas tiun ĉi principon laŭ mezuro de ebleco, penante plej zorge, ke ĝi ne kontraŭagadu al aliaj pli gravaj

твоя для этой цѣли всѣми прочими сторонами. Такъ напр. многіе изъ наиболѣе новыхъ авторовъ проектовъ прибѣгаютъ къ слѣдующей хитрости: зная, что публика оцѣниваетъ всѣ проекты соотвѣтственно тому, какъ къ нимъ отнесутся ученые лингвисты, они стараются не о томъ, чтобы ихъ проектъ былъ дѣйствительно годенъ для чего либо на практикѣ, но стремятся къ тому, чтобы онъ произвелъ хорошее впечатлѣніе въ первую минуту на лингвистовъ; для этого они берутъ свои слова почти безъ всякаго измѣненія изъ наиболѣе важныхъ существующихъ уже натуральныхъ языковъ. Получивши фразу, написанную на этомъ проектированномъ языкѣ, лингвисты замѣчаютъ, что они съ перваго раза поняли эту фразу гораздо легче, чѣмъ на языкѣ Эсперанто,—и авторы проекта уже торжествуютъ и вездѣ объявляютъ, что ихъ языкъ будетъ (если онъ когда либо будетъ доведенъ до конца) гораздо лучше, чѣмъ Эсперанто. Но всякій благо-разумный человекъ тотчасъ же убѣдится, что это есть только иллюзія, что здѣсь незначительному принципу, положенному для показательной стороны и приманки, принесены въ жертву принципы болѣе важные (какъ напр., легкость языка для необразованныхъ, гибкость, богатство, точность и т. д.) и что если бы подобный языкъ и могъ бы быть оконченъ, онъ въ концѣ концовъ абсолютно ничего не далъ бы! Ибо если бы наиболѣе важная заслуга международного языка заключалась въ томъ, чтобы онъ какъ можно легче могъ быть понимаемъ учеными лингвистами, то мы для этой



principoj de lingvo internacia, la projektistoj turnas la tutan atenton nur sur tiun ĉi principon, kaj ĉion alian, nekompareble pli gravan, ili fordonas kiel oferon, ĉar kunigi kaj konsentigi inter si diversajn principojn ili ne povas kaj eĉ ne havas deziron, ĉar ili eĉ mem ne esperas doni ion pretan kaj taŭgan, sed ili volas nur fari efekton.

El ĉio supredirita vi vidas, ke ne ekzistas eĉ la plej malgranda kaŭzo por timi, ke aperus ia nova lingvo, kiu elpuŝus Esperanton, — tiun lingvon, en kiun estas enmetita tiom da talento, tiom da oferoj kaj tiom da jaroj da pacienca kaj varmege aldonita laboro, la lingvon, kiu en la daŭro de multaj jaroj estas jam elprovita en ĉiuj rilatoj kaj en la praktiko tiel bonege plenumas ĉion tion, kion ni povas atendi de lingvo internacia. Sed por vi, estimataj aŭskultantoj, tio ĉi estas ne sufica: vi deziras, ke ni donu al vi plenan kaj senduban

цѣли гораздо проще могли бы взять какой либо языкъ, напр. латинскій, прямо безъ всякихъ измѣненій и ученые лингвисты еще легче поймутъ его съ перваго раза. Принципъ возможно меньшаго измѣненія натуральныхъ словъ не только былъ хорошо извѣстенъ автору языка Эсперанто, но именно отъ него новые авторы проектовъ его и позаимствовались. Но въ то время, какъ Эсперанто пользуется этимъ принципомъ благоразумно, по мѣрѣ возможности, заботливо стараясь, чтобы онъ не шелъ въ противорѣчье съ другими наиболѣе важными принципами международного языка, авторы проектовъ обращаютъ все свое вниманіе только на этотъ принципъ, все же прочее, несравненно болѣе важное, они приносятъ въ жертву этому принципу, не будучи въ состояніи и даже не желая соединить и согласить между собою другія основанія, ибо они сами не надѣются дать что либо совершенно оконченное и пригодное, а желаютъ только сдѣлать эффектъ.

Изъ всего вышесказаннаго вы видите, что не существуетъ даже ни малѣйшей причины бояться появленія новаго языка, который можетъ вытѣснить Эсперанто, — вытѣснить языкъ, въ который вложено столько таланта, столько жертвъ, столько годовъ терпѣливаго и горячо преданнаго труда, языкъ, который въ теченіе многихъ лѣтъ испытанъ уже во всѣхъ отношеніяхъ и на практикѣ такъ хорошо выполняетъ все то, что мы можемъ ожидать отъ международного языка. Но для васъ, уважаемые слушатели, этого не достаточно: вы желаете,



logikan certecon pri tio, ke la lingvo Esperanto ne havos konkurantojn. Feliĉe ni trovas nin en tia situacio, ke ni povas doni al vi tiun ĉi plenan certecon.

Se la tuta esenco de lingvo arta konsistus en ĝia gramatiko, tiam de la momento de la apero de Volapük la demando de lingvo internacia estus solvita por ĉiam kaj iaj konkurantoj al la lingvo Volapük aperi jam ne povus; ĉar malgraŭ diversaj eraroj la gramatiko de Volapük estas tiel facila kaj tiel simpla, ke doni ion multe pli facilan kaj pli simplan oni jam ne povus. Lingvo nova povus diferenci de Volapük nur per kelkaj bagateloj, kaj ĉiu komprenas, ke pro bagateloj neniu entreprenus la kreadon de nova lingvo, kaj la mondo pro bagateloj ne rifuzus la jam tute pretan kaj elprovitan lingvon. En la ekstrema okazo la estonta akademio aŭ kongreso farus en la Volapüka gramatiko tiujn negrandajn ŝanĝojn, kiuj montriĝus utilaj, kaj lingvo internacia sen ia dubo restus Volapük, kaj ĉia konkurado estus por ĉiam esceptita. Sed lingvo konsistas ne sole el gramatiko, sed ankaŭ el vortaro, kaj la ellernado de la vortaro postulas en lingvo arta cent fojojn pli da tempo, ol la ellernado de la gramatiko. Dume Volapük solvis nur la demandon de la gramatiko, kaj la vortaron ĝi lasis tute sen atento, doninte simple tutan kolekton da diversaj elpensitaj vortoj, kiujn ĉiu nova aŭtoro havus la rajton elpensi al si laŭ sia propra deziro. Jen kial jam en la komenco mem de la ekzistado de Volapük eĉ la plej fervoraj Volapükistoj na-

чтобы мы дали вамъ полное и логическое доказательство того, что языкъ Эсперанто не имѣетъ конкурентовъ. Къ счастью мы находимся въ такомъ положеніи, что имѣемъ возможность дать Вамъ и такое полное доказательство.

Если бы вся сущность искусственнаго языка состояла въ его грамматикѣ, тогда съ момента появленія Воляшюка вопросъ о международномъ языкѣ былъ бы навсегда разрѣшенъ, и языкъ Воляшюкъ не имѣлъ бы себѣ конкурентовъ, ибо не смотря на разныя ошибки, грамматика Воляшюка на столько легка и проста, что дать что либо болѣе легкое и простое едва-ли можно себѣ представить. Новый языкъ могъ бы отличаться отъ Воляшюка лишь нѣкоторыми мелочами, а каждый понимаетъ, что изъ за мелочей никто не предприметъ созданія новаго языка и что міръ изъ за мелочей не откажется отъ уже готовога и испытаннаго языка. Въ крайнемъ случаѣ будущая академія или конгрессъ сдѣлали бы въ грамматикѣ Воляшюка тѣ небольшія измѣненія, которыя оказались бы полезными и международнымъ языкомъ остался бы Воляшюкъ, и всякая конкуренція съ нимъ была бы навсегда исключена. Но языкъ состоитъ не только изъ грамматики, но и изъ словаря и изученіе словаря въ искусственномъ языкѣ требуетъ во сто разъ болѣе времени, чѣмъ изученіе грамматики. Между тѣмъ Воляшюкъ разрѣшилъ лишь вопросъ о грамматикѣ, словарь же оставилъ совсѣмъ безъ вниманія, давъ только полную коллекцію выдуманыхъ словъ, которыя могъ бы выдумать



ture timis, ke morgaŭ aperos nova lingvo, tute ne simila je Volapük kaj inter la ambaŭ lingvoj komen-cigos batalado. Tute alia afero estas kun Esperanto: oni scias—kaj tion ĉi eĉ por unu minuto neniam esploro neas,—ke Esperanto solvis ne sole la demandon de la grammatiko, sed ankaŭ la demandon de la vortaro, sekve ne unu malgrandan parton de la problemo, sed la tutan problemon. Kio do en tia okazo restis por fari al la aŭtoro de ia nova lingvo, se tia iam aperus? Al li restus jam nenio ol... eltrovi la jam eltrovitajn Amerikojn! Ni prezentu al ni efektive, ke nun, malgraŭ la jam ekzistantaj, bonega en ĉiuj rilatoj, ĉiuflanke elprovita, havanta jam multegon da adeptoj kaj vastan literaturon lingvo Esperanto, aperis tamen homo, kiu decidis dediĉi tutan serion da jaroj al la kreado de nova lingvo, ke li sukcesis alkonduki sian laboron ĝis la fino kaj ke la lingvo proponita de li montriĝas efektive pli bona el Esperanto,—ni rigardu do, kian vidon havas tiu ĉi lingvo. Se la grammatiko de la lingvo Esperanto, kiu donas plenan eblon esprimi en la plej preciza maniero ĉiujn nuancojn de la homa penso, konsistas tute el 16 malgrandaj reguletoj kaj povas esti ellernita en duono da horo,—tiam kion la nova aŭtoro povus doni pli bonan? En ekstrema okazo li donus eble anstataŭ 16 reguloj 15 kaj anstataŭ 30 minutoj da laborado postulus 25 minutojn? Ĉu ne vere? Sed ĉu deziros iu pro tio ĉi krei novan lingvon kaj ĉu la mondo pro tia bagatelo rifuzos la jam ekzistantan kaj ĉiuflanke elpro-

po своему желанію и каждый новый авторъ. Вотъ почему уже въ самомъ началѣ существованія Воляшюка даже наиболѣе усердные Воляшюкисты естественно боялись, что завтра появится новый языкъ, совершенно не похожій на Воляшюкъ и между обоими языками начнется борьба. Совсѣмъ иначе дѣло обстоитъ съ Эсперанто: извѣстно,—и это не будетъ ни на минуту отрицать ни одинъ изслѣдователь,—что Эсперанто разрѣшилъ не только вопросъ о грамматикѣ, но также и вопросъ о словарѣ и слѣдовательно не только одну маленькую часть задачи, но и всю ее. Что же въ такомъ случаѣ остается дѣлать автору новаго языка, если бы таковой когда либо появился? Ему бы ничего не оставалось, какъ... открывать уже открытую Америку! Представимъ себѣ на самомъ дѣлѣ, что въ настоящее время, не смотря на уже существующій, прекрасный во всѣхъ отношеніяхъ, всесторонне испытанный, имѣющій уже громадное число adeptовъ и обширную литературу языкъ Эсперанто, появился однако человекъ, который рѣшилъ посвятить цѣлый рядъ лѣтъ на созданіе новаго языка, что ему удалось довести свой трудъ до конца, и что предположенный языкъ окажется дѣйствительно лучше, чѣмъ Эсперанто, посмотримъ, какой видъ имѣлъ бы этотъ языкъ. Если грамматика языка Эсперанто, которая даетъ полную возможность выразить самымъ точнымъ образомъ всѣ оттенки человѣческой мысли, состоитъ всего изъ 16 небольшихъ правилъ и можетъ быть изучена въ полчаса,—тогда что лучше можетъ дать новый



vitan? Sendube ne; en ekstrema okazo la mondo diros: „se en via gramatiko ia bagatelo estas pli bona ol en Esperanto, ni tiun ĉi bagatelon enkondukos en Esperanton kaj la afero estos finita“. Kia estos la vortaro de tiu ĉi lingvo? En la nuna tempo nenia esploranto jam dubas, ke la vortaro de lingvo internacia ne povas konsisti el vortoj arbitre elpensitaj, sed devas konsisti nepre el vortoj romana-germanaj en ilia plej komune uzata formo; tio ĉi estas ne por tio, ke—kiel opinias multaj pli novaj projektistoj—la instruitaj lingvistoj povu tuj kompreni tekston skribitan en tiu ĉi lingvo (en tia afero, kiel lingvo internacia, la instruitaj lingvistoj ludas la lastan rolon, ĉar por ili ja tia lingvo estas malplej bezona), sed pro aliaj, pli gravaj kaŭzoj. Tiel ekzemple ekzistas grandega nombro da vortoj tiel nomataj „fremdaj“, kiuj en ĉiuj lingvoj estas uzataj egale kaj al ĉiuj estas konataj sen ellernado kaj kiujn ne uzi estus rekta absurdo; al ili unisone devas soni ankaŭ ĉiuj aliaj vortoj de la vortaro, ĉar alie la lingvo estus sovaĝa, sur ĉiu paŝo estus kunpuŝiĝo de elementoj, malkompreniĝoj, kaj la konstanta regula riĉiĝado de la lingvo estus malfaciligita. Ekzistas ankoraŭ diversaj aliaj kaŭzoj, pro kiuj la vortaro devas esti kunmetita nur el tiaj vortoj kaj ne el aliaj, sed pri tiuj ĉi kaŭzoj, kiel tro specialaj, ni tie ĉi detale ne parolos. Estos sufiĉe, se ni nur diros, ke ĉiuj plej novaj esplorantoj akceptas tiun ĉi leĝon por la vortaro kiel allasantan jam nenan dubon. Kaj ĉar la lingvo Esperanto ĝuste per tiu ĉi leĝo sin

авторъ? Въ крайнемъ случаѣ, онъ далъ бы, возможно, вмѣсто 16 правилъ 15 и вмѣсто 30 минутъ потребовалъ бы 25 минутъ? Не правда ли? Но пожелаетъ ли кто изъ за этого создавать новый языкъ и откажется-ли мiръ изъ за такой малости отъ уже существующаго и всесторонне испытаннаго языка? Конечно нѣтъ; въ крайнемъ случаѣ мiръ скажетъ: „если въ вашей грамматикѣ какая либо бездѣлица лучше, чѣмъ въ Эсперанто, мы эту бездѣлицу введемъ въ Эсперанто и дѣло будетъ кончено“. Каковъ будетъ словарь этого языка? Въ настоящее время никакой изслѣдователь уже не сомнѣвается, что словарь международного языка не можетъ состоять изъ словъ, произвольно выдуманныхъ, но долженъ состоять непременно изъ словъ романо-германскихъ въ ихъ наиболѣе общеупотребительной формѣ; это не потому, какъ думаютъ многіе новѣйшіе авторы проектовъ, — что ученые лингвисты могутъ скорѣе понять текстъ, написанный на этомъ языкѣ (въ такомъ дѣлѣ, какъ международный языкъ, ученые лингвисты играютъ послѣднюю роль, ибо для нихъ такой языкъ наименѣе нуженъ), но по другимъ болѣе важнымъ причинамъ. Такъ, наприм., существуетъ громадное число словъ, такъ называемыхъ иностранныхъ, которые во всѣхъ языкахъ употребляются одинаково и всѣмъ извѣстны безъ заучиванія, такъ что не употреблять ихъ было бы совершенно неразумно. Соответственно этому должны звучать также и другіе слова словаря, иначе языкъ былъ бы грубъ, на каждомъ шагу было бы столкнове-



gvidis kaj ĉar ĉe tiu ĉi leĝo granda arbitro en la elekto de vortoj ekzisti ne povas, restas la demando, kion do povus al ni doni aŭtoro de nova lingvo, se tia estus kreita? Estas vero, ke al tiu aŭ alia vorto oni povus doni pli oportunan formon, — sed da tiaj vortoj ekzistas tre nemulte. Tion ĉi oni la plej bone vidas el tio, ke kian ajn el la multaj projektoj aperintaj post Esperanto vi prenos, vi trovos en ĉiu el ili almenaŭ 60% da vortoj, kiuj havas tute tiun saman formon, kiel en Esperanto. Kaj se vi al tio ĉi ankoraŭ aldonos, ke ankaŭ la restaj 40% da vortoj diferencas de la Esperanta formo pleje nur tial, ke la aŭtoroj de tiuj projektoj aŭ ne turnis atenton sur diversajn principojn, kiuj por lingvo internacia estas trege gravaj, aŭ simple ŝanĝis la vortojn tute sen ia bezono, — vi facile venos al la konkludo, ke la efektiva nombro da vortoj, al kiuj oni anstataŭ la formo Esperanta povus doni formon pli oportunan, prezentas ne pli ol iajn 10%. Sed se en la Esperanta gramatiko oni preskaŭ nenion povas ŝanĝi kaj en la vortaro oni povus ŝanĝi nur iajn 10% da vortoj, tiam estas la demando, kion do prezentus per si la nova lingvo, se ĝi iam estus kreita kaj se ĝi efektive montriĝus kiel lingvo taŭga en ĉiuj rilatoj? Tio ĉi estus ne nova lingvo, sed nur iom ŝanĝita lingvo Esperanto! Sekve la tuta demando pri la estonteco de la lingvo internacia alkondukigas nur al tio, ĉu Esperanto estos akceptita senŝanĝe en ĝia nuna formo, aŭ en ĝi estos faritaj iam iaj ŝanĝoj! Sed tiu ĉi demando por

nie элементовъ, неясностей и постоянное правильное обогащение языка было бы затруднено. Существуют и другія причины, по коимъ словарь долженъ быть составленъ только изъ такихъ словъ, а не изъ иныхъ, но объ этихъ причинахъ, какъ очень специальныхъ, мы здѣсь подробно говорить не будемъ. Будетъ достаточно, если мы только скажемъ, что всѣ наиболѣе новые изслѣдователи принимаютъ этотъ законъ для словаря, какъ недопускающей никакого сомнѣнія. Но такъ какъ языкъ Эсперанто составлялся именно по этому закону, и такъ какъ при существованіи этого закона большого произвола въ выборѣ словъ существовать не можетъ, то остается вопросъ, что же могъ бы намъ дать авторъ новаго языка, если бы такой былъ созданъ. Правда, что тому или иному слову можно дать болѣе удобную форму, но такихъ словъ существуетъ очень не много. Это хорошо видно изъ того, что какой бы изъ многихъ проектовъ, появившихся послѣ Эсперанто, вы не взяли, вы найдете въ каждомъ изъ нихъ покрайней мѣрѣ 60% словъ, которыя имѣютъ ту же самую форму, какъ и въ Эсперанто. И если вы къ этому еще прибавите, что остальные 40% словъ отличаются отъ Эсперантской формы только потому, что авторы этихъ проектовъ или не обращали вниманія на различные принципы, которые для международного языка имѣютъ очень важное значеніе или просто измѣняли слова безъ всякой нужды, — вы легко придете къ заключенію, что дѣйствительное число словъ, которымъ вмѣсто эсперантской формы



la esperantistoj havas jam nenian signifon; ili protestas nur kontraŭ tio, se apartaj personoj volas ŝanĝi Esperanton laŭ sia bontrovo; sed se iam aŭtoritata kongreso aŭ akademio decidus fari en la lingvo tiajn aŭ aliajn ŝanĝojn, la esperantistoj akceptos tion ĉi kun plezuro kaj nenion perdos de tio ĉi: ili ne bezonos tiam de la komenco eilernian novan malfacilan lingvon, sed ili bezonos nur oferi unu aŭ kelkajn tagojn por la ellerno de tiuj ŝanĝoj en la lingvo, kiuj estos faritaj, kaj la afero estos finita.

можно бы было дать форму болѣе удобную, представляет не болѣе 10<sup>0</sup>%. Но если въ Эсперантской грамматикѣ почти ничего нельзя измѣнить, а въ словарѣ можно измѣнить только какихъ нибудь 10<sup>0</sup>% словъ, тогда является вопросъ, что можетъ представлять изъ себя новый языкъ, если онъ когда либо будетъ созданъ, и если бы онъ дѣйствительно оказался языкомъ, пригоднымъ во всѣхъ отношеніяхъ? Это былъ бы не новый языкъ, но только нѣсколько измѣненный языкъ Эсперанто! Слѣдовательно, весь вопросъ о будущности международного языка сводится только къ тому, будетъ ли Эсперанто принять безъ измѣненія въ его настоящей формѣ, или въ немъ будутъ сдѣланы какія либо измѣненія! Но этотъ вопросъ для Эсперантистовъ не имѣетъ никакого значенія; они протестуютъ только противъ того, если бы отдѣльные лица захотѣли его измѣнить согласно своему произвольному желанію; но если какой либо авторитетный конгрессъ или академія рѣшатъ сдѣлать въ языкѣ тѣ или инья измѣненія, Эсперантисты примутъ это съ удовольствіемъ и ничего не потеряютъ отъ этого. Имъ не нужно будетъ тогда снова изучать какой либо новый трудный языкъ, но они вынуждены будутъ только принести въ жертву одинъ или нѣсколько дней для изученія тѣхъ измѣненій въ языкѣ, которыя будутъ сдѣланы и дѣло будетъ окончено.

La esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion tiom perfektan, ke nenio pli alta jam povus ekzisti. Kontraŭe: kiam efektiviĝos aŭtoritata kongreso, pri

Эсперантисты совсѣмъ не претендуютъ, что ихъ языкъ представляетъ нѣчто такое совершенное, что ничто болѣе высокое уже не можетъ существовать. Напротивъ,



kiu oni scios, ke ĝia decido havos forton por la mondo, la espetantistoj mem proponos al ĝi difini komitaton, kiu okupus sin je la trarigardo de la lingvo kaj farus en ĝi ĉiujn utilajn plibonigojn, se eĉ por tio ĉi oni devus ŝanĝi la lingvon ĝis plena nerekonobleco; sed ĉar ekzistas nenia eblo antaŭvidi, ĉu tiu ĉi laboro entute sukcesos al la komitato, ĉu ĝi ne daŭros senfinan serion da jaroj, ĉu ĝi en konsenteco estos alkondukita al feliĉa fino kaj ĉu la finita laboro en la praktiko montriĝos tute taŭga, sekve kompreneble estus tre malsaĝe kaj nepardoneble de la flanko de la komitato, se ĝi pro la problema estontajo rifuzus la faktan kaj en ĉiuj rilatoj finitan kaj elprovitan nunajon; sekve se eĉ la kongreso venus al la konkludo, ke Esperanto ne estas bona, ĝi povus decidi nur la jenon: akcepti dume, la lingvon Esperanto en ĝia nuna forma kaj paralele kun tio ĉi difini komitacion, kiu okupus sin je la perfektigo de tiu ĉi lingvo aŭ je la kreo de ia nova lingvo pli ideala; kaj nur tiam, kiam kun la tempo montriĝus, ke la laborado de la komitato estas feliĉe alkondukita al fino kaj post multaj provoj montriĝis tute taŭga, nur tiam oni povus anonci, ke la nuna formo de la lingvo internacia estas eksigata kaj anstataŭ ĝi eniras en la vivon la formo nova. Ĉiu prudenta homo konsentos, ke la kongreso povas agi nur tiel kaj ne alie. Sekve se ni eĉ supozos, ke fina, lingvo de la estontaj generacioj estos ne Esperanto, sed ia alia ankoraŭ ellaborota lingvo, en ĉia okazo la vojo al tiu lingvo nerpe devas konduki tra Esperanto.

когда осуществится авторитетный конгрессъ, относительно котораго будетъ извѣстно, что его рѣшеніе будетъ имѣть силу для всего міра, Эсперантисты сами предложатъ ему избрать комитетъ, который занялся бы пересмотромъ языка и сдѣлалъ бы въ немъ всѣ полезныя улучшенія, если бы даже для этой цѣли нужно было измѣнить языкъ до полной неузнаваемости; но такъ какъ не существуетъ никакой возможности предвидѣть, удастся ли эта работа комитету, не продолжится ли она безконечное число лѣтъ, будетъ ли она въ согласіи доведена до счастливаго конца и будетъ ли оконченная работа пригодна для практической жизни, то отсюда становится понятнымъ, что со стороны комитета было бы очень неразумно и извинительно, если бы онъ для проблематическаго „будущаго“ отказался бы отъ фактическаго, во всѣхъ отношеніяхъ оконченнаго и испытаннаго „настоящаго“; слѣдовательно, если бы даже конгрессъ пришелъ къ заключенію, что Эсперанто не удовлетворителенъ, то онъ могъ бы рѣшить только слѣдующее: принять пока Эсперанто въ его настоящей формѣ и параллельно съ этимъ опредѣлить комитетъ, который занялся бы усовершенствованіемъ этого языка или созданиемъ какого либо другаго языка, болѣе идеальнаго; и только тогда, когда современемъ оказалось бы, что трудъ комитета счастливо приведенъ къ концу и послѣ многихъ испытаній найденъ совершенно годнымъ, только тогда можно было бы объявить, что настоящая форма языка устраняется, а вмѣсто нея вводится въ жизнь новая. Каждый благоразумный че-



Sekve resumante ĉion, kion ni diris de la komenco ĝis la nuna minuto, ni turnas vian atenton sur tion, ke ni venis al la sekvantaj konkludoj:

1. La enkonduko de lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon;

2. La enkonduko de lingvo internacia estas tute ebla;

3. La enkonduko de lingvo internacia pli aŭ malpli frue nepre kaj sendube efektiviĝos, kiom ajn la rutinistoj batalus kontraŭ tio ĉi;

4. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom arta;

5. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom Esperanto; ĝi aŭ estos lasita por ĉiam en ĝia nuna formo, aŭ en ĝi estos poste faritaj iaj ŝanĝoj.

### VIII.

Kaj nun rigardu, kio sekvas el ĉio, kion ni supre diris. Unue sekvas tio, ke la esperantistoj tute ne estas tiaj fantaziistoj, kiaj ili ŝajnas al multaj tiel nomataj „saĝaj“ kaj „praktikaj“ homoj, kiuj juĝas pri ĉio supraĵe kaj sen ia logika pripenso kaj mezuras ĉion per mezuro-

lovĥкь согласится, что конгрессъ можетъ дѣйствовать только такимъ образомъ, а не иначе. Слѣдовательно, если мы даже предположимъ, что конечный языкъ будущихъ поколѣній будетъ не Эсперанто, но какой либо другой вновь выработанный языкъ, во всякомъ случаѣ, путь къ этому языку долженъ пройти чрезъ Эсперанто.

Резимируя все, что мы сказали съ начала до настоящей минуты, мы обращаемъ ваше вниманіе на слѣдующія заключенія:

1) Введеніе международного языка принесло бы человечеству громадную пользу.

2) Введеніе международного языка совершенно возможно.

3) Введеніе международного языка рано или поздно непременно и несомнѣнно осуществится, сколько бы рутинеры не сопротивлялись этому.

4) Международнымъ языкомъ можетъ быть избранъ только искусственный языкъ.

5) Международнымъ языкомъ можетъ быть избранъ только языкъ Эсперанто; онъ или останется навсегда въ его настоящей формѣ, или въ немъ впослѣдствіи будутъ сдѣланы нѣкоторыя измѣненія.

### VIII.

Теперь мы должны разсмотрѣть, что слѣдуетъ изъ того, что мы сказали выше. Во-первыхъ, слѣдуетъ, что Эсперантисты вовсе не представляютъ изъ себя такихъ фантазеровъ, какими они кажутся многимъ такъ называемымъ „мудрецамъ“ и практическимъ людямъ, которые



rilo de la modo. Ili batalas por afero, kiu ne sole havas grandegan gravecon por la homaro, sed kiu al tio havas en si nenion fantazian kaj kiu pli aŭ malpli frue devas efektiviĝi kaj nepre efektiviĝos, kiom ajn la inerciuloj batalus kontraŭ ĝi, kiom ajn la saĝuloj ŝercadus pri ĝi. Kiel estas sendube, ke post la nokto venas mateno, tiel sendube estas, ke post mallonga aŭ longa batalado Esperanto pli aŭ malpli frue estos enkondukita en komunan uzon por la komunikiĝoj internaciaj. Ni konfirmas tion ĉi kuraĝe ne tial, ke ni tiel volas, ke ni tion esperas, sed tial, ke la konkludoj de simpla logiko diras, ke tiel esti devas kaj ke alie esti ne povas. Longan tamen eble ankoraŭ la esperantistoj devos bataladi, longan tamen eble ankoraŭ ĉia bubo ĵetados sur ilin ŝtonojn, koton kaj malsaĝajn spritaĵojn, sed tio, kio devas veni, pli aŭ malpli frue venos. La iniciatoroj de la Esperanta afero eble ne ĝisvivos ĝis tiu tempo, kiam fariĝos videblaj la fruktoj de ilia agado, ili iros eble en la tombon kun la malestima nomo de homoj, kiuj okupadis sin je infanaĵoj, sed pli aŭ malpli frue por la maldolĉa kaliko, kiun ili trinkas el la manoj de la samtempuloj, la posteuloj konstruos al ili monumentojn kaj elparolados ilian nomon kun la plej granda danko. Longe ankoraŭ eble ili ŝajnos al la mondo senfortaj, multajn fojojn eble ankoraŭ ilia afero ŝajnos al la mondo eĉ mortinta kaj je ĉiam enterigita—sed tiu ĉi afero jam neniam mortos, ĉar ĝi morti jam neniam povas. La afero vivos kaj konstante reme-

судять о всемъ свысока, безъ всякаго логическаго размышленія и все измѣряютъ на мѣрку моды. Эсперантисты сражаются за дѣло, которое не только имѣетъ громадное значеніе для человѣчества, но которое не имѣетъ ничего фантастическаго и рано или поздно должно осуществиться и непременно осуществится, сколько бы инертные люди не сопротивлялись этому и сколько бы разные мудрецы не насмѣхались надъ нимъ. Какъ несомнѣнно, что послѣ ночи наступаетъ утро, такъ несомнѣнно, что послѣ болѣе или менѣе продолжительной битвы Эсперанто рано или поздно будетъ введенъ въ общее употребленіе для международныхъ сообщеній. Мы утверждаемъ это такъ смѣло не потому, что именно мы такъ желаемъ и надѣемся, но потому, что выводы самой элементарной логики показываютъ, что такъ должно быть, что иначе и быть не можетъ. Возможно, что еще долгое время Эсперантисты вынуждены будутъ вести борьбу, возможно, что долгое еще время въ нихъ будутъ бросать камнями, грязью и глупыми остротами, но то, что должно придти, рано или поздно придетъ. Инициаторы Эсперантскаго дѣла возможно, не доживутъ до того времени, когда обнаружатся плоды ихъ дѣятельности, возможно, они войдутъ въ могилу съ обиднымъ именемъ людей, которые занимались глупостями, но рано или поздно вмѣсто горькой чаши, которую они выпиваютъ отъ современниковъ, потмки воздвигнутъ имъ памятники и будутъ произносить ихъ имя съ величайшей благодарностью. Возможно,



morigados pri si; post ĉiu nova silenta tempo, se ĝi eĉ daŭrus dekon da jaroj, aperos nova revigliĝo; kiam laciĝos unuj batalantoj, aperos pli aŭ malpli frue novaj energiaj batalantoj, kaj tiel la afero iros tiel longe, ĝis fine ĝi plene atingos sian celon. Ne malĝoju tial, Esperantistoj, se nesaĝaj homoj ironie rimarkas al vi, ke vi estas ankoraŭ tre malmultaj, ne perdu la kuraĝon, se via afero iras malrapide. La afero konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis; afero bona kaj certa progresas ordinaro malrapide kaj kun grandaj malhelpoj.

Sur la supre montritajn 5 konkludojn ni turnas apartan atenton de tiuj esperantistoj, kiuj batalas por sia ideo senkonscie kaj tial ĉe la plej malgranda rimarko de la kontraŭuloj ekstaras senhelpe kaj ne scias, kion respondi, aŭ perdas la kuraĝon. Ĉiuj tiuj konkludoj prezentas produkton de la simpla kaj severa logiko. Tial se oni diras al vi „la mondo ne volas vian lingvon“, respondu kuraĝe: „ĉu la mondo volas aŭ ne volas, ĝi pli aŭ malpli frue devos akcepti ĝin, ĉar

что еще долго они будут казаться миру бессильными, возможно, что много раз еще будет казаться ихъ дѣло мертвымъ и навсегда похороненнымъ—но дѣло это никогда не умретъ, ибо оно по самому существу не можетъ умереть. Дѣло будетъ жить и постоянно напоминать о себѣ; послѣ каждаго новаго затишья, даже если бы оно продолжалось десятокъ лѣтъ, появится новое оживленіе; когда утомятся первые борцы, появятся рано или поздно новые энергичные защитники и такимъ образомъ дѣло будетъ двигаться впередъ до тѣхъ поръ, пока оно наконецъ не достигнетъ своей цѣли. Не огорчайтесь поэтому, гг. Эсперантисты, если неразумные люди будутъ указывать Вамъ, что Васъ пока еще не много, не теряйте мужества, если ваше дѣло идетъ пока медленно. Дѣло заключается не въ быстротѣ, а въ вѣрности. Много безцѣльныхъ дѣлъ вспыхивали предъ міромъ быстро, но также быстро и погасали; дѣло хорошее и вѣрное обыкновенно подвигается впередъ медленно и съ большими препятствіями.

На 5 вышесдѣланныхъ заключеній мы обращаемъ особенное вниманіе тѣхъ Эсперантистовъ, которые борются за свою идею безсознательно и потому при малѣйшемъ возраженіи противниковъ становятся въ безпомощное положеніе, не знаютъ что имъ отвѣтить и теряютъ мужество. Всѣ эти заключенія представляютъ результатъ простой и строгой логики. Такимъ образомъ, если говорятъ Вамъ: „міръ не желаетъ вашего языка“, отвѣчайте смѣло: „желаетъ ли міръ или не



